
ISSN-1381-2939

# tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



**IJF kun seminario**

**Junularo kaj terminologio**

**La estraro raportas**

n-ro 3/89 julio - septembro 2000 jaro 18

# Enhavo

3 Rekorda festivalo plus seminario
5 Komitataj anoncoj:
6 "Jam temp' esta'"
8 Estrara Jarraporto 1999 - 2000
8 Enkonduko
9 Ĝenerale
12 Landa Agado
14 Eksteraj Rilatoj
21 Seminarioj
22 Informado
24 Kongresoj
25 Financoj
30 Trejnado/Aktivularo
30 Financaj tabeloj
32 Pri komputiloj, kaj multe pli
33 Konatiĝu kun *Gaudeamus*
34 Bunta Esperantio
35 Estrara adresaro

*Saluton!*

*Nu, lastpaĝe en la antaŭa numero mi petis vin sendi vian artikolon antaŭ la 1-a de junio, sed kiam vi vidis tion jam estis julio, aŭ preskaŭ. Pro administraj komplikaĵoj tiu numero longe kuŝis ĉe la presejo.*

*Ĉi-numere aperas la estrara jarraporto, sed ĉi-foje ĝi estas nekutime longa. Ja gravas ke la estraro raportas al la membroj sed verŝajne vi preferus legi pli pri aliaj aferoj, ĉu ne? Do, informu pri viaj agadoj kaj projektoj. En la sekva numero mi planas listigi la landajn sekciojn en rangordo laŭ kiom ili informas pri siaj agadoj.*

*Ĉu vi partoprenos (aŭ partoprenis) en iu renkontiĝo ĉi-somere? Mi esperas ke vi ĝuos la eventon, ankaŭ ke vi emos transdoni iom da via ĝuo al la legantoj de TT per artikolo. Mi mem partoprenos en la Skota Semajno, mia unua renkontiĝo en Britio.*

*Rick*

## Redaktofino por TT n-ro 4/90: 1-a de septembro

Sendu viajn kontribuojn ĝustatempe. Kion faras via landa aŭ loka Esperanto-organizo? Verku kaj sendu artikolon pri tio. Ni volonte akceptas informojn pri skandaloj! Bonvenaj estas kompreneble ĉiam reagoj, plendoj kaj laŭdoj. Sendu ankaŭ fotojn (petu se vi volas ke ni resendu ilin). Se vi sendas materialon retpoŝte, prefere uzu formaton de simpla teksto (*.txt). Ne uzeblas materialo en formato de MS Word97 (aŭ pli nova), sed pli fruaj versioj ĝis 6.0 uzeblas.

*TEJO Tutmonde estas trimonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝi aperas en 1.500 ekzempleroj. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin. (Kontaktu la estraranon pri landa agado).*

*Redaktas:* ***Rick Newsum, 8 Mead Way, Sea Mills, Bristol, Britio, BS9 2EZ.*** *Tel./faks.: +44-117-9684683; retadreso:* ***<tejo-tutmonde@esperanto.org>***. *Presigas kaj ekspedas en Pollando: Maciej Wnuk, tel.: +48-601-209239; rete: <nepo@elektron.pl>*

# Rekorda festivalo plus seminario

**De la 19-a ĝis la 25-a de aprilo 2000 okazis en Cavallino, proksime de Venecio, la 24a Internacia Junulara Festivalo (IJF), unu el la plej gravaj junularaj E-aranĝoj, certe la plej granda en la printempo, kaj ĉi-foje ĝi estis iom nekutima.**

Ĉi-jare la Festivalon organizis ne nur Itala Esperantista Junularo (IEJ), sed ankaŭ TEJO. Tio ebligis ke ĝi estu samtempe ankaŭ "Seminario pri Eŭropa Integriĝo", ke ĝi ricevu grandan subvencion de la Konsilio de Eŭropo, kaj ke – pro la malaltegaj kotizoj – partoprenu pli da homoj. Fakte ĉeestis pli ol 320 (rekordo por IJF); aparte multis orienteŭropanoj, ĉefe bulgaroj.

*abunda programo, kaj ne nur*

La kondiĉoj estis tre bonaj: luksega ejo – kompare al averaĝa E-renkontiĝejo – kun granda ĝardeno kaj propra plaĝo; bonegaj manĝoj (sed, kiel kutime en Italio, multe malpli por vegetaranoj...); belega kaj suna vetero, kaj Venecio atingebla per 40-minuta publikŝipa vojaĝo.

Laŭ mia impreso la partoprenantoj ĝenerale tre kontentis pri la Festivalo, pro la ĉi-supraj kialoj kaj pro la programo. Ĉiuvespere okazis unu aŭ eĉ du sinsekvaj, bonkvalitaj programeroj. Interalie eblis partopreni eĉ kvar koncertojn: du rokajn, unu gospelan kaj unu de ĵus E-istiĝinta popkantisto, laŭdire ege fama en Bulgario. Teatraĵojn prezentis la zagrebanoj (kiel kutime tre avangardan) kaj la torinanoj (kiel kutime tre amuzan kaj sukcesan). La tradicia Internacia Vespero certe estis unu el la plej belaj kiujn mi iam ajn spertis.

Nokte funkciis bona diskejo kaj bona trinkejo (zorge de la lionaj KTP-anoj); bedaŭrindete ili iom konkurencis unu al la alia (ĉar ankaŭ en la trinkejo oni dancis), kaj ĉar neniu el la du venkis mi neniam vidis vere amasan dancadon.

La taga programo estis sufiĉe plena, ĉar al la kutimaj festivalaĵoj aldoniĝis multaj kromaj eroj: TEJO organizis la seminarian parton, kun kontribuoj de spertuloj kiel Anna Ritamäki kaj Detlev Blanke; Akademio Internacia de la Sciencoj, same kiel pasintfestivale, okazigis studsesiojn kaj disdonis diplomojn al la lernintoj; Katalin Smidéliusz gvidis bonegan kurson por E-instruistoj; Itala E-Federacio okazigis diskutojn inter aktivuloj; religiemuloj, fine, povis esperantlingve diservi, pilgrimi en Venecio kaj interreligie preĝi.

*tute brile – aŭ preskaŭ*

Kiel ĉiam, estas eble ankaŭ trovi malbonaĵojn ankaŭ en tiu ĉi aranĝo. Laŭ mi la ĉefa estas, ke oni malbone komunikis al la partoprenantoj kio okazas kaj okazos. La Festivala kajero estis tre malabunda kaj sufiĉe aĉa; la programtabulo malmulte informis (ekzemple ofte estis skribita nur la nomo de preleganto sed ne pri kio temas la

prelego); pri la ekskursoj oni anoncis iom malfrue, kaj tiu kiun mi partoprenis estis vere lastmomente improvizita. Ankaŭ la inaŭguro aranĝiĝis nur lastminute, kaj, male ol kutimis ĝis antaŭ du jaroj, ĝi ne estis ankaŭ okazo por publikaj rilatoj kun lokaj gravuloj.

Tiuj ĉi problemoj, laŭ mia takso, influas nur malmulte al la impreso kiun la partoprenantoj ricevas de E-aranĝo; sed kompreneble ili estas bedaŭrindaj. Laŭ mi pri ili kulpas unuavice la malmulta homforto de la organizantoj. Ili estis vere malmultegaj, kaj la Festivalo pli grandis ol kutime, do ili tre dankinde laboregis kaj ne indis antaŭvidi pli da ilia zorgado pri detaloj. Krome iom influis la internacieco de la teamo. Ŝajnas al mi ke la kunlaboro inter ĝia IEJ-flanko kaj tiu de TEJO ne funkciis perfekte: eĉ surloke ne klaris kiu faru kion, kaj tio, male, prefere klaru jam monatojn antaŭ la IJF. Verŝajne, kvankam ĉiuj parolas E-on, oni ne perfekte komunikis unu al la alia siajn ideojn dum la preparaj kunsidoj kaj interretaj diskutoj, kaj dum la renkontiĝo la situacio ĉiam estas tiom streĉa ke ne eblas solvi multe.

Kiel partopreninto en la IJF, mi ĉiukaze tre ĝojas pri kiel ĝi funkciis. Al homoj, kiuj intencus internacie organizi simile kunmetitan renkontiĝon, mi konsilus esti realismaj kaj antaŭkalkuli iom da problemoj; sed, se ili eltenos tion kaj la rezulto similos al la pasinta IJF, ili povos kontenti kaj fieri.

Giuseppe Castelli, Italio

## AEGEE – kvazaŭ-Esperanta asocio

**"Mi ĉiam ŝatis vojaĝi, sed ĝis antaŭ kelkaj jaroj mi povis nur sperti hotelojn kaj turismajn lokojn, sen vere konatiĝi kun la lokaj homoj, kulturo, vivo. Nun, male, se mi iras ien, mi tuj informiĝas ĉu eblas kontakti anojn de mia movado, kaj tra ili mi ekhavas tujan kaj fortan ligon al la lando kaj sentas min hejme en ĝi!"**

**Iom konataj vortoj, ĉu ne? Mi aŭdis ilin ĉe la IJF, sed atentu: diris ilin ne esperantisto, sed Elena, aktivulino de AEGEE – Association des Etats Généraux des Etudiants de l'Europe (Forumo de la Eŭropaj Studentoj). Ŝajne tiu asocio sintenas mirige simile al esperantistoj rilate al multaj aferoj, kaj ĝia agado, simile al nia, konsistas grandparte el organizado de grandaj kaj malgrandaj (sed ĉiam malmultekostaj) renkontiĝoj.**

**IEJ starigis kontaktojn kun ĝi, por ke okazu reciprokaj invitoj, trejnado, reklamado, kaj la partopreno de ĝiaj anoj en la IJF estas ekzemplo de tio. Estus interese se ankaŭ en aliaj landoj okazus tiaj kontaktoj.**

**Se vi volas scii pli – kaj eble partopreni AEGEE-aranĝon por kompari ĝin al la esperantaj – vizitu ĝian TTT-ejon ĉe:**

**<http://www.aegee.org>.**

# Komitataj anoncoj

## Komitatanoj B de TEJO por la oficperiodo 2000 - 2002

En la pasinta numero de TEJO Tutmonde vi povis legi kandidatiĝajn sinprezentojn de novaj komitatanoj B de TEJO (reprezentantoj de individuaj membroj). Individuaj membroj de TEJO rajtis elekti ĉi foje maksimume ok kandidatojn. Entute alvenis sep kandidatiĝoj. Ĉar alvenis malpli da kandidatiĝoj ol estis elekteblaj postenoj, la kandidatoj elektiĝas aŭtomate sen balotado (laŭ la Reglamento pri elekto de komitatanoj B, artikolo 4), se iliaj kandidatiĝoj plenumis ĉiujn kondiĉojn, kiel priskribite en la Reglamento, artikolo 3.

Bedaŭrinde la estraro konstatis ke unu el kandidatoj ne plenumis ĉiujn preskribitajn kondiĉojn de la kandidatiĝo kaj sekve tamen ne elektiĝis kiel nova komitatano B de TEJO.

Por la periodo 2000 - 2002 elektiĝis la jenaj kandidatoj:

Isacir Andreoni (Brazilo)
Hélène Barkoviĉ (Francio)
Oleg Dadaev (Ukrainio/Rusio)
Rafael Despradel (Dominikana Resp.)
Paul Kwasi Mensah (Ghanao)
Nakamura Daishin (Japanio).

La nova komitato de TEJO oficas ekde la 1-a de junio 2000 ĝis la 3-a de majo 2002.

Nome de la estraro, mi gratulas al ĉiuj elektitoj kaj esperas je bona kunlaboro kun ĉiuj dum la sekvaj du jaroj.

**Vlaďka Chvátalová**
**Ĝenerala Sekretario de TEJO**



## Rezultoj de skriba voĉdonado

Okazis poŝta voĉdono de la Komitato pri:

1) alelektota ĝenerala sekretario, kaj
2) pri LS-iĝo de la Junulara Organizo Togolanda Esperantista (JOTE).

Alvenis 23 el 44 validaj voĉoj pri 1), ĉiuj 23 jesaj, nek neoj nek sindetenoj. Sekve Vlaďka nun estas alelektita ĝenerala sekretario.

Ankaŭ pri 2) alvenis 23 validaj voĉoj, ĉiuj 23 jesaj, nek neoj nek sindetenoj. Do JOTE nun estas la 42-a LS de TEJO.

Gratulon al ambaŭ!
Sandra Schweder
TEJO-volontulo en CO

# “Jam temp’ esta”

**La TEJO-volontulo iom prilumas gravan sed ofte miskomprenatan agadkampon, en kiu bezonatas novaj fortoj de entuziasmaj junuloj.**

Terminologio kaj terminologia laboro en siaj ĝustaj sencoj estas relative novaj kampoj en Esperantujo. Temas pri la scienco pri la nocioj kaj ties nomigoj en la faklingva kampo, resp. la ellaboro de terminaroj laŭ la principoj de tiu scienco. Tio sonas komplika kaj malfacila, sed esence temas pri 5 bazaj principoj (vidu sube).

Oftas la miskompreno ke “terminaro” estas sinonima al “fakvortaro”. Ili tamen estas du aferoj malsamaj laŭ estiĝo, kvankam ili havas certan interrilaton. Fakvortaro kutime pritraktas preskaŭ la tutan fakon, estas du- aŭ plurlingva, farita de unu aŭtoro, al kiu helpas kelkaj (ofte samlingvaj) samfakuloj. Sed tia vortaro malrespektas terminologiajn principojn, eĉ se ĝia kreanto eble nomas ĝin *terminaro*. Terminaro pritraktas nur fakeron, sed por la tuta Esperantujo kaj laŭ terminologiaj principoj. Por ĝin krei endas internacia kunlaboro kaj sistemeco, “por ke fine la unuopaj terminaroj mozaike kovru la tutan fakon”. (Dankon al M. Malovec pro la bela vortumo.)

*radikoj en esperanto*

Krome, terminaro estas facile vortarigebla: oni simple ordigas la sistemigitajn nociojn laŭ alfabeto. (Tiel bona fakvortaro povas esti bazita sur terminaro, sed tiu terminaro staras kvazaŭ nevideble malantaŭ ĝi, tiel ke uzantoj ne scias pri ĝia ekzisto.) Sed apenaŭ eblas terminarigi fakvortaron, ĉar kutima fakvortaro ne havas nocio-sistemon. Tamen vortaroj povas utili kiel fontmaterialoj por terminaroj – aparte tiuj kun difinoj/klarigoj, kaj/aŭ uzo en kunteksto – krom la nepre ĉerpindaj fakaj tekstoj.

Moderna terminologia laboro havas siajn radikojn en Esperanto: Eugen Wüster, patro de moderna terminologio, estis esperantisto kaj dediĉis al ĝi trionon de sia doktoriga disertacio. Ankaŭ la internacia terminologia komisiono ISA 37, kaj la de ĝi rezultinta komisiono ISO/TC 37, estiĝis laŭ instigo de esperantistoj, plej ĉefe de Wüster kiu kunlaboris je la nunaj terminologiaj normoj kaj rekomendoj de ISO/TC 37.

*forstistoj kaj fervojistoj*

Des pli mirigas ke oni ĝuste en Esperantujo, foje eĉ konscie, preteratentas ilin. Ofte verkantoj de “terminaro” laboras aŭ laboris preter la internacie agnoskitaj terminologiaj principoj. Foje ili simple ne scias pri tiaj principoj, sed foje ili konscie rifuzas ilin: ĉar ili ne donas rapidajn kaj multnombrajn rezultojn, ĉar ili postulas kunlaboremon, aŭ simple ĉar ili “por Esperanto ne validas”. Esceptoj malmultas (ekzemple ĉe forstistoj kaj fervojistoj jam ekestas promesplenaj projektoj). De tie ankaŭ la ege malsama kvalito de fakaj “terminaroj”, kiu siaflanke influas la kvaliton de fakaj verkoj.

Kiaj do estas tiuj principoj? Nu, jen: Diskuto pri vortoj, vortumoj kaj neolog-

ismoj estu nur la *plej lasta* paŝo de terminologia laboro. Antaŭe nepras

1) dividi la fakon en prilaboreblajn subkampojn,

2) priserĉi kaj analizi la jam aperintan fakan literaturon pri tiu subkampo,

3) klasifiki la trovitaĵojn kaj ordigi ilin en nocio-sistemon (pli-malpli en formo de arbo; en plurlingva terminaro estu aparta sistemo por ĉiu lingvo, por trovi "truojn"),

4) difini la nociojn,

5) kaj nur je la fino pripensi kiel nomi tion aŭ jenon.

Tia procedmaniero estas sendependa de fakoj kaj lingvoj. Por uzi ĝin en Esperanto, necesas nur kelkaj adaptoj rilate al detalaĵoj, sed ĝenerale funkcias same kiel por etnaj lingvoj.

La Terminologia Esperanto-Centro (TEC), fondita komence de la 80-aj jaroj, celis disvastigi tiujn principojn. TEC kaj klopodis kaj klopodas:

1) centre kunordigi terminologian laboron en la multaj aplikkampoj de Esperanto,

2) arkivi verkojn kaj fontomaterialojn,

3) teni kontaktojn kun ISO, Infoterm k.s. gravaj internaciaj institucioj, kaj

4) antaŭenigi en la movado plian rekonon de sencohava terminologia laboro.

Por la fiaskiĝo de TEC ekzistas pluraj kialoj: manko de mono, manko de homfortoj aparte en gvidaj pozicioj, manko de fizika centro, manko de interkonsentemo pri teknikaĵoj, tro fruaj klopodoj normigi. Krome la plejmulto de ties kunlaborintoj troviĝis en Orienta Eŭropo, do pro la politikaj ŝanĝoj en la lastaj jaroj ankaŭ TEC multe suferis kaj nun fakte ne funkcias. Ĝi pluekzistas sub la poŝtadreso de antaŭa TEC-aktivulino Wera Blanke, kaj tamen sukcesis eldoni la *Terminologian Gvidilon* en 1998. Tiu-ĉi mallonga, konciza kaj tre klare skribita broŝuro de eksa estrino de ISO/TC 37, H. Suonuuti, priskribas ĉiujn necesajn paŝojn por atingi taŭgajn rezultojn. Krome TEC sukcesis ekhavi bonajn rilatojn kun internaciaj terminologiaj institucioj kiel ISO, TermNet kaj Infoterm.

Nun TEC bezonas subtenon por daŭrigi la strebojn, lerninte el la antaŭaj malfaciloj. Por daŭrigo de la TEC-streboj, laŭ mia takso ĝuste ni junuloj estas bezonataj. La komencoj estas promesplenaj: la interreto plifaciligas kunlaboron tra la mondo, ekzistas diskutlisto, kaj ankaŭ kontaktoj eksteren al internaciaj organizoj jam ekzistas. Nun necesas krei reton de homoj interesitaj kaj kunlaboremaj, por havigi al ni taŭgajn Esperanto-terminologion kaj terminarojn, uzeblajn kaj ankaŭ eksteren prezenteblajn. "Jam temp' esta'" je la sojlo de nova jarmilo.

**Kontaktadresoj:**

S. Schweder (aŭtoro de ĉi-supra artikolo):
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,
tel +31 10 436 1044, fakso 436 1751,
<tejo-oficejo@esperanto.org>

W. kaj D. Blanke (TEC):
Otto-Nagel-Strasse 110,
DE-12683 Berlin, Germanujo,
tel. +49-30-5412633, fakso 5456742,
<blanke.gil@snafu.de>

P. Chrdle (reta diskutlisto):
<chrdle@kava-pech.cz>

# Estrara Jarraporto 1999 - 2000

## 1. Enkonduko

Raportas Sjoerd Bosga, Prezidanto

La pasinta jaro estis por TEJO sufiĉe turbulenta, sed samtempe indas priskribi ĝin kiel pozitiva. Ĝi estis jaro de kontrastoj: okazis ekzemple la plej granda IJK de la jardeko, sed samtempe estis tre ege malfacile kunigi aktivulojn por konsistigi novan estraron.

Estis jaro en kiu multo rilatis al manko de aktivemo por TEJO, kaj al serĉado de novaj aktivuloj. Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, kunmetiĝis nova estraro. Ĉar ne eblis kunmeti sufiĉe da homoj, pli poste en la jaro aldoniĝis sepa estrarano: Vladka Chvátalová unue neformale ekagis kiel ĝenerala sekretario, kaj poste la komitato per poŝta voĉdono alelektis ŝin formale. Speciale menciindas la laboro de la elekta komisiono, konsistanta el Anna-Lena Eriksson kaj Mirjam Walter, kiu ankaŭ nun helpas la komitaton pri serĉado de aktivuloj kaj kandidatoj por postenoj. Bedaŭrinde aperis nova vaka posteno en la estraro kiam interkonsente kun la cetero de la estraro Griŝa Arosjev forlasis sian postenon kaj la organizon. Sekve serĉatas respondeculo(j) pri seminarioj kaj landa agado (kaj cetere ankaŭ kunordigante de eŭropa parto de niaj eksteraj rilatoj).

Estis jaro ankaŭ, en kiu ni ekkonsciis ĝuste kiom gravegas respekto de aliaj homoj. Temas ne nur pri tio agnoski la valoron de ĉies ideoj kaj planoj, laŭdi iniciativojn kaj doni al ili lokon en TEJO. Temas ankaŭ ne nur pri la rekono ke ni estraranoj estas certe ne la plej kapablaj homoj en TEJO. Sed temas ankaŭ pri tio ke respekto de aliaj homoj, iliaj sentoj kaj kapabloj, estas eco kiun estrarano de TEJO ne rajtas malhavi, sendepende de ŝia aŭ lia entuziasmo, laboremo, laborkapablo, aliaj ecoj aŭ atingaĵoj. Jen grava leciono por la estonto.

Transdoni spertojn al niaj posteuloj entute estas inter la plej prioritataj de la nuna aktivularo. Skribiĝis konsilaro por ĝenerala sekretario, skribatas manlibro por kasistoj, manlibro pri lingvofestivaloj, taskolistoj – kaj sekvos pli. Samtempe ankaŭ transdono de spertoj de unu volontulo al sekva ricevis pli altan prioritaton: laŭeble ĉiam estu nova antaŭ foriro de antaŭa.

La TEJO-laboro en la Centra Oficejo plistabiliĝis danke al la nova volontulo ekde septembro: Sandra Schweder. Menciindas ankaŭ ŝia partopreno en la IJK en Veszprém, kie ŝi konsiderinde faciligis la ĉiukaze pezan laboron de la estraranoj, zorgis pri videbleco de TEJO en TEJO-budo, kaj samtempe spertiĝis kaj konatiĝis kun la organizo. Laŭ financaj ebloj, TEJO strebos ke ĉiam la volontulo laboru ankaŭ en la IJK. Restas tamen la bezono pri plia laborprenanto en la oficejo, kaj okazis diskutoj kun UEA pri oficistaj laborhoroj por TEJO.

Kadre de la IJK la Komitato akceptis rezolucion pri homaj rajtoj, aparte alvokante al UEA pritrakti tiun temon en sia kongreso, kio evidente okazas. Aldonaj klarigoj al la rezolucio aperis en TT januaro/junio 2000.

## 2. Ĝenerale

Raportas Vladka Chvátalová, Ĝenerala Sekretario

### 2.1. Estraro

En la komitatkunsido dum IJK en Veszprém elektiĝis nova seskapa estraro por la periodo 2000 - 2002 en la konsisto Sjoerd Bosga (prezidanto), Aleksandr Blinov (ĝenerala sekretario, KER), Ilja De Coster (kasisto), Holger Boos (kongresoj), Grigorij Arosjev (landa agado, seminarioj) kaj Joaquín Rosillo Vega Acosta (informado). Ĉar ne estis dezirinda kunligi postenon de Ĝenerala Sekretario kun KER-gvidanto, la Komitato kaj la nove elektita estraro strebis helpe de la elekta komisiono trovi kandidaton por alelekto de sepa estrarano, kiu transprenus taskojn de ĝenerala sekretario. Ekde novembro 1999 eklaboris kiel aganta Ĝenerala Sekretario Vladka Chvátalová, kiu oficiale alelektiĝis per skribaj balotoj aprile 2000 (alvenis 23 validaj voĉoj el 44 eblaj, ĉiuj jesaj). Post ambaŭflanka interkonsento forlasis estraron Grigorij Arosjev aprile 2000.

La estraranoj komunikas inter si tre ofte kaj vigle pri diversaj temoj preskaŭ senescepte rete, krome aperas en dusemajna ritmo estraraj cirkuleroj, kunordigataj de la ĝenerala sekretario, kaj dissendata al la estraro kaj komisiitoj, kiuj parte ankaŭ kontribuas al ĝia enhavo. Necesas ankoraŭ tamen plibonigi la komunikadon inter la estraro kaj la komisiitoj, kaj eventuale redifini komisiitajn taskojn.

Ni eklaboru jam nun kun la elekta komisiono pri serĉado de ontaj estraranoj kaj strebu al ĝustatempa trejniĝo de la kandidatoj. Ni provu ekverki manlibron por estraranoj, kiu enhavu manlibrojn (aŭ komence almenaŭ taskolistojn) de ĉiuj kampoj por plifaciligi eklaboron de ontaj novaj estraroj. Novaj estraranoj povus ĉiam aktualigi materialojn kaj aldoni proprajn spertojn. Nun ekzistas manlibro por ĝenerala sekretario, verkita de Jeroen Balkenende, kaj estas preparata manlibro por kasistoj far de Ilja, nuna kasisto de TEJO.

Ni strebu redifini estrarajn taskojn por estonto laŭ niaj nunaj bezonoj. La aktuala divido de taskoj estas konstanta ekde jaroj, kvankam la agadokampoj de TEJO ŝanĝiĝas. Tiu redifino povus helpi ankaŭ al la elekta komisiono trovi pli bone bezonatajn kandidatojn.

### 2.2. Estrarkunsidoj

(Pri tiu ĉi artikolo raportas Sjoerd Bosga, Prezidanto, kaj Aleksandr Blinov, Estrarano pri KER)

La estraro kunvenis de la 11-a ĝis la 13-a de novembro 1999 kaj de la 31-a de marto ĝis la 2-a de aprilo 2000. Komence la estraro dediĉis tempon al konatiĝo kaj uzis i.a. personectestón (t.e. Belbin-testo) por eki diskuton pri manieroj labori kaj kunlabori.

Dum sia unua estrarkunsido la nova estraro dediĉis parton de sia tempo por diskuti kaj analizi la nunan staton de la junulara movado kaj ankaŭ por ellabori strategion por TEJO kaj prioritatojn de la estraro por la venonta dujaro.

Inter la diverseco de opinioj videblis kelkaj ĉefaj prioritatoj:

- ✰ doni pli da atento al soci-utilaj flankoj, ke TEJO kiel movada strukturo ne nur spronu la movadon, sed ankaŭ pli aktive engaĝu sin pri la laboro utila kaj necesa por la socio;

- ☆ pli plene uzi eblecojn de pres-organoj de TEJO, speciale socian kaj movadan rolon de Kontakto;
- ☆ pli intense serĉi kaj trejni novajn aktivulojn;
- ☆ dediĉi pli da atento al strategiaj aspektoj en la laboro de TEJO.

Samtempe temis pri graveco bone aranĝi la internan funkciadon en TEJO: tiu de la komitato, kun pli aktiva engaĝo de la komitato en TEJO-laboron.

La diskuto evidentiĝis pli tempopostula ol atendite kaj estis decidite lasi ĝin por reta pritrakto. La diskutrondo pri TEJO-strategio, inciatoj, problemoj, ideoj ks. antaŭ nelonge estis lanĉita ĉe http://www.egroups.com. Por aliĝi necesas sendi ajnan mesaĝon al tejo-subscribe@egroups.com. Kompreneble ankaŭ eblas perpoŝte sendi ideojn kaj proponojn al la estraro!

En la dua estrarkunsido estis jam tre multaj konkretaj punktoj kiuj bezonis diskuton aŭ/ kaj decidon. Kiel planite jam por parto de la unua kunsido, la estraro laboris en formo de kelkpersonaj laborgrupoj. Tiel la diskutoj en plenkunsido iĝis pli efikaj kaj pli konkretaj.

En ambaŭ kunsidoj ĉeestis gastoj: eks-estraranoj aktive kontribuis per siaj spertoj kaj reprezentanto de JEFO kundiskutis pri la propono pri IJK en Francio.

**2.3. Komitato**

En junio 2000 okazis ŝanĝo en konsisto de la Komitato, la 31-an de majo 2000 finiĝis laborperiodo de la Komitato 1998 - 2000. La nuna Komitato laboras ekde la 1-a de junio 2000 ĝis la 31-a de majo 2002, kaj momente ĝi konsistas nur el komitatanoj A (reprezentantoj de Landaj Sekcioj) kaj B (reprezentantoj de Individuaj Membroj). Dum la komitatkunveno en Honkongo eblas elekti ankaŭ novajn komitatanojn C.

Komence de la jaro 2000 estis dissenditaj nomumiloj de novaj komitatanoj A al Landaj Sekcioj, bedaŭrinde ne venis respondo de ĉiuj. Tia nereagado ankaŭ malfaciligas komunikadon kaj kunlaboron inter TEJO kaj LS-oj. Por komitataneco B kandidatiĝis sep personoj, ses kandidatiĝoj estis validaj. Tiu kandidatoj aŭtomate elektiĝis sen skriba voĉdonado, ĉar entute eblis elekti ok komitatanojn B. Estonte ni pli instigu niajn Individuaj Membroj al kandidatiĝoj.

Ĝenerale pliboniĝis komunikado inter komitatanoj kaj la estraro. En dumonata ritmo aperas komitata cirkulero, kies koncepto ŝanĝiĝis. Ĝi ne estas nur verkata de estraranoj por aliaj komitatanoj, sed komitatanoj mem kontribuas al ĝi per diversaj informoj, proponoj kaj komentoj. Entute la estraro havas impreson, ke la komunikado en TEJO revigliĝas, sed ĉefe en la direkto de la estraro al la komitato (vidu ankaŭ artikolon 6.1. pri tio). Estus dezirinde, se ankaŭ komitatanoj kaj komisiitoj mem pli uzus por diversaj internaj diskutoj dissendoadresojn tejo-komitato@esperanto.org kaj tejo-komisiitoj@esperanto.org.

**2.4. Novaj Landaj Sekcioj**

Dum IJK en Veszprém akceptiĝis nova Landa Sekcio de TEJO, Honkonga Junulara Esperanto-Asocio HKJEA. Per skribaj balotoj akceptiĝis aprile 2000 ankaŭ Junulara

Organizo Togolanda Esperantista (JOTE) kiel nova Landa Sekcio de TEJO. Tiel la nombro de LS-oj kreskis al 42.

**2.5. Membrociferoj**

| Individuaj membroj de TEJO | | fine de 1998 | fine de 1999 |
|---|---|---|---|
| Sume: | | 728 | 688 |
| el kiuj: | TEJO-membro kun Jarlibro | 452 | 451 |
| | TEJO-membro kun abono de "Esperanto" | 259 | 220 |
| | dumviva membro en TEJO-aĝo | 17 | 17 |

Necesas trovi strategion kontraŭ falantaj membronombroj, ĉefe per plibonigo de publikaĵoj kaj servoj, rabatoj kaj kreo de komuna identeco.

**2.6. Rilatoj inter TEJO kaj UEA**

(Pri tiu ĉi artikolo raportas Sjoerd Bosga, Prezidanto)

Observanto en la estraro de UEA ekde la somero estis Sjoerd Bosga. Li partoprenis en la kunsidoj dum UK en Berlino kaj en CO fine de aprilo 2000. Krome la observanto de TEJO aldoniĝis al la reta diskutlisto de la UEA estraro, kaj la observanto de UEA (Michela Lipari) ricevis la estrarajn cirkulerojn de TEJO (malgraŭ teknikaj problemoj). Estis interese konstati ke la du estraroj alfrontas tre similajn problemojn, kaj utilis la interŝanĝo de spertoj kaj ideoj. Ofta konsilanto al TEJO-aktivuloj estis UEA-vicprezidanto Renato Corsetti.

Kiam la situacio en TEJO en unua duono de 1999 estis plej kriza, ekestis la ideo ke estu komisiito de UEA pri junulara agado por helpi al ambaŭ estraroj kaj plifortigi la rilatojn. Nun tamen ni komune strebas plifortigi la ekzistantan strukturon de komitatanoj kaj observantoj. Samtempe TEJO havos la subtenon de pluraj el siaj eks-aktivuloj, formantaj lozan strukturon por tio.

**2.7. Komitatanoj A de TEJO ĉe UEA**

Momente niaj komitatanoj A ĉe UEA estas Jimmy Stryhn Meyer kaj Reza Torabi. Dum IJK en Vestprém ne estis nomumitaj novaj. La mandato de la nuna UEA-komitato finiĝos kun komenco de la UK 2001 en Zagrebo. Ni strebu sendi al UK-oj anstataŭantojn por la komitatkunvenoj de UEA, kaj nepre nomumu novajn komitatanojn por TEJO dum IJK 2001. Estonte ni nepre ne forgesu pri tiu nomumo.

**2.8. Nova komisiono pri lingvaj festivaloj**

(Surbaze de informoj de Jekaterina Jevlampieva, Komisiito pri Lingvaj Festivaloj)

De 1996 en Ĉeboksari, Rusio, ĉiujare okazas Lingva Festivalo, inspirite de la ideo LinguaFest' de la uson-franca esperantisto Dennis Keefe. Ĝin organizas la Junulara Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko kaj celas precipe eksteran publikon, interesiĝantan pri diversaj lingvoj de la mondo. En ĝi Esperanto rolas kiel unu el gravaj pontlingvoj. Surbaze de spertoj de la

Festivaloj en Ĉeboksari estis verkita malneta versio de manlibro pri organizado de Lingvaj Festivaloj. Laŭ modelo de ĉeboksara festivalo en urbo Ivanovo en Rusio pasintjare okazis la 1-a Lingva Festivalo. Intereso pri la Festivalo estis montrita fare de pluraj aktivuloj de diversaj landoj. Por la venonta jaro TEJO intencas okazigi seminarion ligitan kun la iniciato pri Lingvaj Festivaloj kun la temo: "La lingva ĉielarko – ponto al kulturaj trezoroj". Dum la marta estrarkunsido estis akceptita propono pri kreo de la komisiono pri Lingvaj Festivaloj, kiun ekgvidis Jekaterina Jevlampieva.

## 3. Landa Agado

(Raportas Sjoerd Bosga, Prezidanto)

### 3.1. Ĝenerale

Landa agado en TEJO estas laborkampo kiu jam delonge meritas pli da atento kaj pli da kunordigado, ĉar estas ĝi kiu kunligas la landajn sekciojn kaj individuojn kiuj komune konsistigas TEJO-n. En la komitatkunsidoj de 1999, komitata laborgrupo proponis senŝanĝe transpreni rezultojn de simila laborgrupo en 1997, kun la jenaj ĉefaj punktoj:

☆ kontaktoj inter landaj sekcioj (ĉeloj, helpo al malriĉaj, interŝanĝo de aktivuloj, komunaj subvencieblaj projektoj);

☆ kontaktoj inter estraro kaj LS-oj (instigo al regiona kunlaboro kaj renkontiĝoj, kolektado de informoj, informado pri kaj instigo kontakti al junularaj konsilioj kaj regionaj strukturoj, starigo de komisiono pri landa agado);

☆ kontaktoj inter estraro kaj aktivuloj en landoj sen landa sekcio (informado pri TEJO, instigo al fondo de LS, kontakti intajn membrojn, kolektado de kontaktadresoj);

☆ servoj de TEJO al landaj sekcioj kaj unuopaj aktivuloj (TEJO-volontulo en CO kaj transdono de nomoj de ne-akceptitaj kandidatoj por volontulado en LS-oj, helpo pri subvencipetado, helpo pri retpaĝfarado, starigo de retaj distribulistoj por aliĝiloj, petoj, ofertoj kaj raportoj);

☆ uzado de ekzistantaj retaj servoj por diskonigo de informoj.

Komence de la laborperiodo de la nova estraro la laboro nur malrapide ekis, pro troa okupiteco pri alia laborkampo de la respondeca estrarano. Ekde aprilo 2000, la laboro denove stagnis pro tio ke Griŝa Arosjev forlasis la estraron. Tamen agado okazas, danke al aliaj estraranoj (Joaquin agadis en Ameriko), la volontulo en la CO, kaj ne malgrave, Sabira Ståhlberg (helpe de Kontakto kaj pro ŝiaj bonaj rilatoj kun Aziaj aktivuloj).

Por ekkoni la problemojn kaj bezonojn de la landaj sekcioj, kaj samtempe ĝisdatigi administrajn informojn pri ili, prepariĝis enketilo. Ĝi tamen ne sendiĝis. Plia envolviĝo de aktivuloj el diversaj landoj en TEJO-tutmonde estis planita en formo de regionaj redaktoroj.

### 3.2. Afriko

Dum la estrarkunsido en oktobro raportis al la estraro la UEA-volontulo Raoul Kouamigan Hounnake, kaj dum la jaro estis bonaj kontaktoj kun la UEA-estrarano en Afriko, Gbeglo

Koffi. Ĉefa problemo estas informado – estu komisiitoj (nuntempe estas nur Yao Afantchao) por teni la kontaktojn kaj respondi al demandoj. Al 7-a Togolanda Esperanto-kongreso fine de decembro sendiĝis salutmesaĝo.

Pere de poŝta voĉdono komence de 2000a jaro, la komitato akceptis JOTE-n (Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj) kiel 42-an LS de TEJO. Ni esperas je bona kunlaboro kaj daŭraj kontaktoj!

En Niĝerio la problemoj inter diversaj kluboj kaj grupoj ŝajne malaperis. Laŭ informo de Gbeglo Koffi, NIJEK ekis kontaktojn kun grupoj kaj aktivuloj el la tuta lando. La estraro kontaktis NIJEK-on kaj ĝi sekve denove petis aliĝon al TEJO, traktinda dum la venonta komitatkunsido.

### 3.3. Ameriko

En Ameriko agadis Joaquin, kiu kontaktis kun aktivuloj precipe en suda kaj meza Ameriko. Okazas multe da lokaj kaj regionaj Esperanto aranĝoj. I.a. Joaquin envolviĝas en la organizado de la 5-a Tutamerika Kongreso, en Meksik-urbo, en aprilo 2001. En urbo Celaya (Meksiko) okazis AIS-Kongreso, kun partopreno de 40 junaj lernantoj de Esperanto.

En San Francisco (Usono) ĉiujare okazas la Esperantaj Someraj Klasoj en la Ŝtata Universitato. En 2000a jaro estas planata samtempe finado de la vidbenda kurso *Pasporto al la Tuta Mondo* de ELNA.

Post la Tutamerika Kongreso en Bogota, Kolombio kaj restarigo de Landa Asocio, kolombiaj esperantisoj okazigis sian Kvinan Nacian Kongreson en Ibageo kaj decidis krei junularan sekcion. Bazo por tiu ebla nova landa sekcio estas la Aktiva Bogota Esperantista Junulara Asocio. Unua junulara kongreso estas planata por aŭgusto 2000, en Bogota. Oni planas retan kontakton kun la IJK en Honkongo, okazanta samtempe.

### 3.4. Azio

Dum la komitatkunsidoj en Veszprém akceptiĝis nova landa sekcio de TEJO, la Honkonga Junulara Esperanto-Asocio (HKJEA). Pro la speciala statuso de Honkongo en Ĉinio HKJEA ne povas kunfandiĝi kun ĈJEA, kaj sekve tiu akceptiĝo ne kontraŭas regularon de TEJO. En la jaro 2000, HKJEA kunlabore kun ĈJEA organizas la 56an IJK. Ĝi atendatas havi stimulan efikon al la junulara Esperanto-agado en Azio. Reprezentanto de ĈJEA reklamis la kongreson i.a. en la Azia kongreso en Hanojo.

Okaze de la 50 jara jubileo de El popola Ĉinio, Sabira Ståhlberg parolis nome de TEJO.

### 3.5. Eŭropo

Estis kontaktoj kun Makedonio pri fondo de landa organizo kiu povus aliĝi al TEJO. Problemoj inter du urboj ŝajne malaperis kaj atendatas pliaj kontaktoj.

Mallonge antaŭ la IJK en Veszprém TEJO ricevis aliĝpeton de la Esperantista Junulara Organizo de Respubliko Serba (EJOdeRS, el Bosnio-Hercegovino). Ĝi estas junulara sekcio de la Esperanto-Ligo de Respubliko Serba kiu petis aliĝon al UEA. Laŭregulare, TEJO ne rajtas akcepti EJOdeRS ĝis kiam UEA akceptas la plenkreskulan asocion. Oni strebas tamen

regule kontakti.

En novembro 1999 okazis MEJK, konferenco de mezeŭropaj junularaj Esperanto-asocioj en Bydgoszcz, Pollando. Ĝi estis unu el la signoj de reviviĝo de Pola Esperanto-Junularo. Pluraj TEJO-aktivuloj partoprenis, i.a. pro la samtempa samloka preparkunsido por la IJF.

En Finnlando prepariĝis nova okazo de KEF, la Kultura Esperanto-Festivalo. Estis bonaj kontaktoj inter la organizantoj kaj TEJO, kaj ni esperas ke KEF ne nur stimulos la Esperanto-kulturon, sed ankaŭ instigos al reaktiviĝo de FEJO.

Kadre de Rusia Esperanto-Kongreso en februaro 2000 okazis pluraj ŝanĝoj en SEJM. I.a. ĝi ŝanĝis nomon al REJM, Rusia Esperanto-Junulara Movado.

### 3.6. Oceanio

UEA okupiĝis pri fondado de komisiono pri tiu mondoparto, kaj serĉis ankaŭ kunlaborantojn de la flanko de TEJO por tio. Kunlaborantoj ankoraŭ ne estas trovitaj.

## 4. Eksteraj Rilatoj

Raportas Anna Ritamäki, Komisiito pri Lingvaj Rajtoj, helpe de Sandra Schweder (TEJO-volontulo), Aleksandr Blinov (Estrarano pri KER), Hélène Barković (KER-Komisiito) kaj Ralf Fröhlich (KER-Komisiito)

### 4.1. Ĝenerale

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO respondecas pri la reprezentado de TEJO ĉe diversaj internaciaj organizaĵoj kaj instancoj. Pro la forteco de tiaj instancoj en Eŭropo la laboro de KER koncentriĝis en tiu mondoparto, malgraŭ la deziro plivastigi ĝin.

Dum la pasinta jaro la administra flanko de la KER-agado pozitive evoluis, danke al la forta kaj sistema laboro de la TEJO-volontulo en la Centra Oficejo Sandra Schweder, kaj subteno kaj konsilado al ŝi ĉefe flanke de Anna Ritamäki kaj Sabira Stahlberg, KER-spertuloj. Estos gravege ĝuste transdoni tiun laboron al posta volontulo. En la estraro ekde la IJK pri KER respondecis Aleksander Blinov, kiu ĝis la eklaboro de Vladka Chvátalová ankaŭ estis ŝarĝita per la taskoj de ĝenerala sekretario.

Dum la jaro oni serĉis aktivulon por – kiel komisiito aŭ estrarano – kunordigi ĉefe la Eŭropan agadon de KER, sed ne jam trovis. Praktike antaŭaj aktivuloj (i.a. Jimmy Stryhn Meyer kaj Sabira Ståhlberg, kiu krome ankaŭ en la pasinta jaro reprezentis TEJO-n) grave rolis per siaj konsiloj al la TEJO-volontulo kaj la estraro, kaj Anna Ritamäki (komisiito pri KER/lingvaj rajtoj) plivastigis sian agadon al diversaj aliaj laborterenoj de KER. Hélène (Enĉi) Barković transprenis la reprezentadon en la FoJE-komitatkunsidoj de Ralf Fröhlich, kiu plue prizorgis la reprezentadon de TEJO en la organo, kiu reprezentas la junularajn neregistarajn organizaĵojn en la prijunulara decidprocezo de Konsilio de Eŭropo. TEJO membras en tiu ĉi Konsila Konsilio (nova nomo post reorganiziĝo de la decidstrukturoj, antaŭulo Konsila Komitato).

### 4.2. Administrado

KER, same kiel TEJO ĝenerale, suferis pro la organiza krizo kiun la nova estraro devis alfronti tuj je sia elektiĝo. Pluraj problemoj de la pasintaj jaroj restis nesolvitaj. Ĉefe temis pri mankantaj raportoj al niaj subvencidonantoj, ĉefe al Eŭropa Junulara Fondaĵo, kiu kiel establo de Konsilio de Eŭropo estas inter niaj ĉefaj interregistaraj partneroj kun kiuj ni rilatas. Dum la unua duonjaro la fortoj de la KER-aktivuloj estis uzataj ĉefe por trakto de la plej urĝaj problemoj. Ĝis kaj dum la oktobra seminario de TEJO en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo, Francio, pluraj minacoj estis fine venkitaj. Pliaj problemoj reaperis poste kaj la rutino ankoraŭ ne estas establita por plena stabiligo de la rilatoj, sed la estraro estas konscia pri la aferoj pritraktindaj. La subvencirilata agado nun estas multe pli celkonscia.

Kiel gravan paŝon en klarigan direkton pri la rolo de la Centra Oficejo, TEJO ekhavis eksplicitan kontaktpersonon (respondeculon) inter la dungitoj en la Centra Oficejo: la direktoro de la oficejo Pasquale Zapelli, kiu ankaŭ forte kontribuis al la plenumo de niaj eksteraj devoj (i.a. lige al EJF).

Sandra Schweder enposteniĝis kiel TEJO-volontulo en septembro post (la nuna estrarano) Aleksander Blinov, kiu volontulis ĝis julio. Ŝi ludis esencan rolon en la solvado de la kriza situacio de TEJO kiel peranto de subvencirilataj kaj aliaj informoj inter la oficistoj kaj la TEJO-aktivuloj kaj kiel plenumanto de pluraj eksteraj kontaktoj i.a. al niaj subvencidonantoj.

Kiel stipendiito de la Demosthenes-fondaĵo de KdE Jekaterina Jevlampieva volontulis por TEJO 22.08.-28.09.1999 por pliprofundigi siajn sciojn kaj disvastigi la intereson pri lingvaj festivaloj.

Sandra ekkompilis listojn de interesiĝantoj pri diversaj kampoj. Tiuj informoj estis uzitaj i.a. por trovo de kandidatoj por reprezentiĝoj. La oficeja kunordigo de reprezentiĝoj kaj la arkivado de KER-ligitaj informoj signife progresis. Videbla rezulto estas la listoj de kursoj kaj reprezentiĝoj (sube).

Okazis diskutoj pri bezono de TEJO-dungito en Bruselo por bone provi prizorgi lobiadon kaj kontakton kun la eŭropaj (kaj mondaj) amaskomunikiloj.

### 4.3. Reprezentiĝoj eŭropaj – en Forumo Junulara

TEJO prizorgis la bazan agadon de membroorganizo en Forumo Junulara Eŭropa. FoJE estas kunlabora strukturo de ĉirkaŭ 90 organizoj, ankaŭ naciaj junularaj konsilioj. Kelkaj de niaj Landaj Sekcioj estas membroj de sialandaj junularaj konsilioj, sed TEJO ne havas superrigardon pri la situacio kaj ĝis nun ne sukcesis multe subteni la landan agadon pri eksteraj rilatoj. La eksteraj rilatoj de TEJO kaj ties LS-oj estas potenciale tre reciproke profitaj.

TEJO partoprenis la FoJE-komitatkunsidojn kaj ankaŭ reagis al iuj demandoj kaj invitoj. I.a. ni respondis al enketo pri la (ne)aktiveco pri seksa egaleco en nia organizo. Enĉi kontaktis kun pluraj FoJE-aktivuloj pri aranĝado de FoJE-aktiveco ligita al la Eŭropa jaro de la lingvoj 2001. La retpoŝta versio de angla- kaj francalingva informilo Youth Opinion/Opinion Jeunesse (Junulara Opinio) de FoJE estis plusendita regule de la oficejo. La gazeto ne plu

estas magazineca, sed pli koncize informa. Ne plu ekzistas la FoJE-cirkulero What´s new?/ Quoi de neuf? (Kio nova?).

TEJO ne membris en la komisionoj, projektgvidaj grupoj k.s. de FoJE, ankaŭ ne proponis kandidatojn. Neniu aparte interesa posteno por TEJO estis proponita dum la jaro. Aliflanke ni ankaŭ suferis de ne sufiĉe vasta kontaktreto de jam iom spertaj aktivuloj.

Sekvafoje okazos elektoj por la organoj de FoJE en la Ĝenerala Asembleo 18-21-an de oktobro 2000. Du reprezentantoj de ĉiu membroorganizo invitiĝos al la ĝenerala-asembleo-kunsido de FoJE; temas pri tre taŭga okazo por novulo spertiĝi kune kun spertulo.

TEJO serĉas kandidatojn kiuj interesiĝas pri iuj specifaj temoj kadre de FoJE, ekz. kontraŭrasisma agado, seksa egaleco, homaj rajtoj kaj edukado aŭ pri specifaj regiontipaj kunlaboroj, ekz. inter la ĉirkaŭmediteraneaj landoj, kun arabaj landoj, kun pacifikaj landoj, kun Latinameriko, kun Afriko aŭ kun Azio. Ni tre bezonas ankaŭ aktivulojn ekstereŭropajn. En Eŭropo ni speciale serĉas personojn pretajn transpreni gravan respondecon pri aferoj ligitaj al KdE aŭ EU. Sufiĉas ke la kandidatoj estas spertaj pri la esperantomovado kaj havas entuziasmon, interesiĝon pri politika agado, eltenemon lerni iom post iom pri TEJO kaj pri eŭropaj strukturoj kaj kapablon komunike krom en Esperanto ankaŭ en la angla kaj/aŭ la franca (kaj/aŭ la hispana por agado kun Latinameriko k.t.p.).

TEJO ne partoprenis en la interregiona kunlaboro (Eŭropo kun aliaj mondopartoj) de FoJE kaj ne havis aktivajn kontaktojn kun la Nordsuda Centro de KdE, ekz. ni ne sendis reprezentanton al ilia porjunulara kurso.

**FoJE-reprezentiĝoj kaj -trejniĝoj:**

- ☆ Diskuto kaj informtago de FoJE pri financado en Bruselo 30-31.3. 2000, Sandra Schweder partoprenis. (Pasintjare partoprenis Jeroen Balkenende kaj Ilja De Coster.)
- ☆ Konsultiĝo pri la estonta EU-progamo YOUTH en Bruselo 23.2.2000, Sandra Schweder kaj Enĉi Barkovic partoprenis.
- ☆ Enĉi Barkovic partoprenis en la plenumkomitataj kunsidoj de FoJE en Ĝenevo (CH) 26.-28.11.1999 kaj en Ponta Delgada, Azoraj insuloj (PT) 14.-16.04.2000.
- ☆ Junulara Festivalo en Ankara 11-17.12.1999, Sabira Ståhlberg partoprenis kiel unu de la eksterlandaj partoprenantoj de FoJE, prelegis kaj prezentis TEJO-n ĉe stando kaj prelegante. Ŝi informiĝis pri la stato de junulara movado en Turkio kaj ekhavis plurajn valorajn kontaktojn, kiuj i. a. rezultos partoprenon de turkoj en la Varna-seminario (vidu 5.3.)
- ☆ Gvidtalenta trejniĝo (kun speciala atento al seksa egaleco) 17.-21.02.2000 en Budapeŝto. Partoprenis de TEJO Elena Payuk (UA).
- ☆ Publikaj rilatoj kaj merkatado (26.-30.04.2000), TEJO rekomendis Ralf G. Fröhlich (SE) kiel unua prioritato, Maria Abramova (BG), Irina Barac (HR) kaj Daniele Binaghi (IT). Neniu akceptiĝis.
- ☆ Alia trejnkurso de FoJE pri financado de entreprenoj en junularaj asocioj, devintus okazi en junio 2000 sed ŝoviĝis al ankoraŭ nekonata dato.

☆ FoJE-seminario “Lernado por aktiva kaj demokratia civitaneco” (25.-30.08.2000, Budapeŝto, limdato 16.07.2000) ĝis nun (08.06.) interesiĝis Daniele Binaghi (IT).

☆ Pere de FoJE ni ricevis informojn pri diversaj trejnkursoj de aliaj organizaĵoj. Ni provis aligi Zoran Ciric (YU) al maja seminario pri mediteranea kunagado pri volontula laboro en Turkio sed ni ne ricevis reagojn de la organizantoj. Ankaŭ por iuj aliaj aranĝoj plusendiĝis informoj kaj anonciĝis interesitoj sed sen sukcesa rezulto pro diversaj kialoj (ekz. miskomprenoj, malfruoj, malkompletaj informoj).

TEJO plu aktivas en la direkcio pri junularo kaj sporto de KdE. TEJO membras en la Konsila Konsilio (nova nomo post reorganiziĝo de la decidstrukturoj pri junulara aferoj en KdE, antaŭulo Konsila Komitato) ĝis oktobro, kiam finiĝos nia tria sinsekva periodo en la kundecidaj organoj.

Nome de la Konsila Konsilio Ralf partoprenas la kunsidojn de la Eŭropa agantejo por junulara informado kaj konsilado, ERYICA kaj la preparadon de interregistara ronda tablo pri ne-formala edukado.

TEJO povas kandidatiĝi denove por la KK post du jaroj. Por entrepreni kandidatiĝon ni kompreneble bezonas taŭgajn reprezentantojn, ekz. aktivulon spertiĝintan en FoJE-komisiono. FoJE estas la formala rekomendanto de la kandidatoj por la KK kaj la findecida Programa komitato. La elektoj okazas dum la Ĝenerala Asembleo de FoJE.

TEJO partoprenas kaj subtenas per eta kotizo la kontraŭrasisman reton UNITED for intercultural action (Unuiĝintaj por interkultura agado). Niaj kontaktoj kun UNITED ne estis tre viglaj, sed la oficejo de UNITED ricevis informon pri nia interesiĝo kunlabori speciale pri lingvegalecaj flankoj. Krome al seminario de UNITED kaj ILGA (internacia geja asocio) aliĝis proprainiciate Leon Roijen (NL) kun posta TEJO-rekomendo (“Sexual Orientation Discrimination”, 21.-25.06.2000 en Vieno). Ni ankoraŭ ne scias ĉu li akceptiĝis.

**4.4. Reprezentiĝoj ekstereŭropaj – manko de agado**

TEJO ne havis aktivajn kontaktojn kun la junulara fako de UN, sed antaŭe forte envolviĝis en la Mondaj Junularaj Forumoj (la pasinta okazis en 1998.) La laboro de Ralf Fröhlich kiel projekta dungito de la UN-programo pri aidoso tamen pozitive influis nerekte pro lia TEJO-fono.

Håkan Lundberg (SE) partoprenis en la Jarmila Forumo de UN en Novjorko kunlabore kun reprezentantoj de UEA.

TEJO ne aktivis kadre de Kunordiga Komitato de Internacia Volontula Servo (KKIVS), nek kadre de UNESKO aldone al la vizito de Jekaterina Jevlampieva. Pluraj aktivuloj de TEJO ricevis la raportojn pri la UEA-agado kun UNESKO, sed konkretaj paŝoj al kunagado ne estis prenitaj.

Niaj kontaktoj kun aliregionaj tegmentaj organizaĵoj ne progresis, ankaŭ ne enkadre de FoJE, kiu kiel la plej riĉa kaj administre granda organizaĵo provizas la plej favorajn partoprenkondiĉojn. Pere de ĝi eblus evoluigi ankaŭ tutmondajn kontaktojn se ni sukcesus

kunordigi la aktivulojn kiuj povus interesiĝis pri KER tutmonde. Jen la listo de la aliregionaj partneroj de FoJE kiel ekzemploj de eblaj forumoj en kiuj TEJO povus kunagadi: Afrika junulara reto, Araba junulara unuiĝo, Azia junulara konsilio, Azia studenta asocio, Karibia junulara federacio, Latinamerika junulara forumo (FLAJ), Tuteŭropa afrika movado de la junuloj kaj Pacifika junulara konsilio.

**4.5. Trejnado de aktivuloj**

Grava efiko de la laboro de TEJO pri Eksteraj Rilatoj estas la ebleco por TEJO-anoj partopreni en seminarioj kaj trejnkursoj. Temas ne nur pri la seminarioj de TEJO mem (vidu sub seminarioj), sed ankaŭ tiuj de aliaj organizoj kaj speciale trejnkursoj de KdE (nuntempe ofte organizitaj kunlabore kun Eŭropa Unio) kaj de FoJE. Je tiaj okazoj TEJO-membroj ne nur reprezentas nian junularan movadon, sed samtempe trejniĝas kaj spertiĝas.

En la oktobra EJC-seminario partoprenis pluraj aktivuloj sen antaŭa TEJO-nivela sperto. Pluraj ankaŭ post la seminario kunagadis. Du el ili partoprenos KdE-kurson, trejniĝon bonan ekzemple por okazigo de TEJO-seminarioj: Jekatarina Burmisova (RU) por TEJO kaj Alko Golden (HU) kiel reprezentanto ne de TEJO, sed de studenta organizo. Rezulto de pli fruaj trejniĝoj estas, ke Enĉi Barkovic ankaŭ ĉeestos ĝin kiel portempe dungita trejnisto. Oktobre Enĉi partoprenis la KdE-kurson "Trejnado por trejnantoj" en Budapeŝto kiel reprezentanto de TEJO. En antaŭa jaro ŝi volontulis ĉe la Strasburga EJC. Ŝi kaj Ralf Fröhlich estas de tempo al tempo dungitaj kiel trejnistoj por kursoj aŭ seminarioj de aliaj organizoj.

La interesa nova gazeto Coyote – gazeto por junularaj trejnantoj (de KdE kaj EU) estis pludistribuita al kelkaj aktivuloj, sed sendube ekzistas pliaj membroj kiuj profitus de ĝia ricevo. Ankaŭ tradukitaj aŭ adaptitaj artikoloj de ĝi povus servi kiel inspira materialo por niaj eldonaĵoj kaj kursoj. Coyote aperas en la lingvoj angla kaj franca.

La renovigo de la provizora dua eldono de la KER-manlibro (de 1998) ne progresis.

TEJO rajtas kandidatigi siajn aktivulojn al trejnkursoj por aktivuloj de junularaj organizoj de Konsilio de Eŭropo (kelkaj tradiciaj KdE-kursoj kaj kelkaj novaj estas organizitaj kunlabore kun Eŭropa Unio). La laborlingvoj plej ofte estas la angla kaj la franca (la laborlingvoj de KdE) kaj la okazejoj la Eŭropaj Junularaj Centroj en Strasburgo kaj Budapeŝto. Kutime la vojaĝkostoj de la partoprenantoj estas plene repagataj. Sube menciiĝas la plej gravaj poraktivulaj KdE-kursoj. Kutime la samaj aŭ similaj kursoj okazas ĉiujare. Interesiĝantoj bonvolu sin turni al la TEJO-volontulo en la Centra Oficejo.

**Trejnkursoj de KdE 2000:**

- ☆ Volontula agado (27.02.-05.03.2000), rekomendiĝis Dejan Parushev (BG) kaj Sandra Schweder (DE/NL); neniu de TEJO akceptiĝis.
- ☆ Trejnado por trejnantoj (22.03.-02.04.2000), ĉi-jare neniu kandidatiĝis.
- ☆ Enkonduko en la organizadon de internaciaj junularaj aranĝoj (18.06.-01.07.2000), TEJO rekomendis Katja Burmisova (RU) kaj Paul Kwasi Mensah (GH). Akceptiĝis Katja.
- ☆ Partopreno kaj civitaneco, longtempa trejnkurso speciale ligita al porminoritata agado

(marto ĝis novembro 2000). Rekomendiĝis Jevgenija Ŝlikanova (RU), sed ne akceptiĝis. Ĝis nun neniu de TEJO partoprenis tiun ĉi dupartan kurson subtenan al realigo de multkultura projekto.

☆ Projektoj en Sud-Orienta Eŭropo, longtempa trejnkurso (ekde septembro). Neniu aliĝis.

☆ Trejnkurso por junaj sociscienciśtoj (07.-11.09.2000). Al tiu ĉi nova kurso TEJO rekomendis Elisabetta Cirio (IT/GB) kun prezento de ŝia studenta esplorlaboro ligita al sociologiaj aspektoj de la junulara esperantokomunumo. Ankoraŭ ne venis informo pri akceptiĝo.

☆ Agado en internaciaj junularaj strukturoj (27.08.-07.09). TEJO rekomendis Jevgenija Ŝlikanova (RU).

☆ Trejnado por trejnantoj agantaj en centra kaj orienta Eŭropo (05.-16.09.). TEJO rekomendis Natalja Grigorievskaja.

☆ Meze de aprilo alvenis informoj paperaj pri du novaj KdE-trejnkursoj kaj tri interligitaj laborkampoj. Ĉiuj celas agadon en sudorienta Eŭropo. Ne proponiĝis aliĝoj flanke de TEJO.

☆ Okazas KdE-trejnkursoj por junularaj aktivuloj en iuj specifaj eŭropaj landoj, speciale en postkomunismaj landoj. TEJO povas kandidatigi spertokundividajn partoprenantojn de aliaj landoj. La landa sekcio en la specifa lando povas partoprenigi siajn reprezentantojn. (Ni eksciis, ke du membroj de Kroatia Esperanto-Junulara Asocio partoprenis en la KdE-kurso en Kroatio, sed nek havis kontaktojn kun la reprezentantoj nek havas informojn pri LS-partoprenoj de la aliaj landoj kie okazis tiaj kursoj.)

**Lingvokursoj de KdE:**

Ĝis februaro 2000 alvenis 13 kandidatiĝoj por la lingvokursoj de Konsilio de Eŭropo en somero 2000. Je la limdato de 01.03, TEJO povis rekomendi 10 (la maksimumon) el ili por akceptiĝo flanke de KdE: Raia Androvska (BG), Irina Barac (HR), Vladka Chvátalová (CZ), Dovile Dimindaviciute (LT), Ulrich Farrenkopf (DE), Nastja Koĵevnikova (RU), Darius Kubilius (LT), Silvia Man (SE), Borislava Zaharieva (BG), Eugenia Zvereva (UA). En aprilo KdE nuligis unu de la kursoj pro budĝetaj kialoj. Komence de majo alvenis informo, ke inter la restantaj 9 kandidatoj du akceptiĝis rekte (Vladka, Irina) kaj du pliaj estas en la atendolisto (Nastja, Darius).

**4.6. Evoluigo de la lingvopolitika agado de TEJO**

Origine la bezono de formiĝo de lingvopolitiko de TEJO plej forte sentiĝis en KER, kies aktivuloj iniciatis seriozan ekpritrakton de tiu temaro. Surbaze de idedokumento bazita sur la rezultoj de laborgrupa diskutado en la EJC-seminario de 1998 en Budapeŝto la diskuto daŭris. Komitata laborgrupo en Veszprém proponis ke Anna Ritamäki, kiel komisiito pri lingvaj rajtoj, kunordigu la formuladon de raporto al la estraro ĝis la fino de 2000 cele al komitata akcepto de dokumento sekvajare.

Pluraj personoj diskutis la temon kaj la ideoj signife maturiĝis post Veszprém. Sandra

kaj Vladka partoprenis kiel reprezentantoj de TEJO en kunsido alvokita de UEA pri lingvopolitikaj temoj en Roterdamo (27-28.11.1999). Surbaze de la spertoj de tiu kunsido disvastiĝis plia konscio pri la internaj aspektoj de lingvopolitiko, la politiko pri la lingvo Esperanto kaj ekestis ideoj okupiĝi pri la sciencrilataj aspektoj de la lingvopolitiko de Esperanto (interlingvistiko, esperantologio, terminologio...). La estraro en sia marta kunsido komisiis al Sandra Schweder kunordigi novan sciencan agadon de TEJO (emfazo de lingva diverseco kaj scienca agado).

La volontulado de Jekaterina Jevlampieva kontribuis al la plifortigo kaj plikonkretigo de la ideoj pri progresigo de lingva diverseco. Ŝi dum sia volontulado vizitis plurajn organizaĵojn kaj kontaktis kun pluraj aktivuloj kaj de esperantaj kaj de eksteraj organizaĵoj: Organising Bureau of European School Student Unions (OBESSU, eŭropa organizaĵo de lernantoj) Amsterdamo (NL); Flandra Esperantista Junulara Asocio (FLEJA), Flandra Esperanto-Ligo (FEL), Service Civil International (SCI, organizanto de labortendaroj), Antverpeno (BE); Forumo Junulara Eŭropa, Eŭropa Buroo por malpli uzataj lingvoj, European Federation for Intercultural Learning (EFIL, lernantointerŝanĝa organizaĵo), Bruselo (BE), Junulara kunordiga buroo de de UNESKO, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO), Parizo (FR); Konsilio de Eŭropo, Strasburgo (FR) dum Malferma tago 19.9.2000; konatiĝo kun lokaj esperantistoj, kiuj partoprenis Lingvan Festivalon en Luksemburgo (LU).

La novaj kontaktoj kaj disvastigo de la informoj pri lingvaj festivaloj, festoj kaj simiilaj okazoj, kaj pri la eblecoj kiujn havas la Esperanto-movado en tiuj ĉi kampoj progresigis la lingvopolitikan agadon de TEJO. TEJO petis la rajton organizi EJC-seminarion "La lingva ĉielarko – ponto al kulturaj trezoroj" kiel trejnkurson pri organizado de projektoj por valorigo de lingva diverseco. Poste venis la ideo disvastigi la uzon de *Lingva ĉielarko* kaj sub tiu nomo lanĉi pli vastan projekton de kunligado de ĉi-rilataj agadoj kadre de TEJO. Jekaterina Jevlampieva estis elektita komisiito de TEJO.

TEJO kunlaboras kun kelkaj aliaj organizaĵoj (aŭ ties reprezentantoj) en Forumo Junulara

**Mallongigoj kaj klarigoj pri KER-parto:**

FoJE = Forumo Junulara Eŭropa (angle: European Youth Forum; france: Forum Européen de la Jeunesse, mallongigite ambaŭlingve YFJ – Youth Forum Jeunesse – por eviti konfuzojn kun la Eŭropa Junulara Fondaĵo, kiu mallongiĝus same. Inversigo de la angla vortordo solvas la saman problemon en Esperanto: FoJE). En FoJE membras ĉirkaŭ 90 organizaĵoj. Membras naciaj junularaj konsilioj kaj internaciaj neregistaraj junularaj organizaĵoj, ekzemple TEJO, kiu membras ekde ĝia fondiĝo en 1996. TTT-paĝo: http://www.youthforum.org

En la TTT-paĝoj de la Direkcio pri junularo kaj sporto de la Konsilio de Eŭropo <http://www.coe.fr/youth> haveblas informoj en la angla kaj franca i.a. pri Eŭropa Junulara Fondaĵo, Eŭropaj Junularaj Centroj, trejn- kaj lingvokursoj.

UNESKO estas la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo.

provante instigi aktivan partoprenon de FoJE en la Eŭropa Jaro de la lingvoj 2001.

TEJO kaj Akadamio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) ofertis varian lingvopolitikan programon dum la Internacia Junulara Festivalo en Cavallino (IT) 19-25.4.2000. Prelegis i.a. Detlev Blanke, Renato Corsetti, Carlo Minnaja kaj Anna Ritamäki.

Lingvopolitiko estas evoluanta al temaro meritanta propran fakon en TEJO. Ĝi havas gravan ligon al KER, sed enhavas ankaŭ multon alian, i.a. lingvo- kaj egaleco-teman aktivulan trejnadon.

La estraro de TEJO dankas al ĉiuj KER-aktivuloj por ilia aktiva kaj profitodona agado.

## 5. Seminarioj

Raportas Sandra Schweder, TEJO-volontulo en CO

### 5.1. EJC Strasburgo, oktobro 1999

Laŭ kvanto de partoprenantoj la seminario "Internaciismo kaj Naciismo – ĉu konfliktaj aŭ kompletigaj ideoj?" (24-31.10.1999 en Strasburgo/Francio) estis sukcesega, ĉiuj 35 lokoj estis okupitaj. La partoprenantoj venis el kvar kontinentoj kaj kontribuis per tre diversaj vidpunktoj. Vittorio Dell'Aquila (kiel neesperantista gasto), Marcus "Ziko" Sikosek, Ilja De Coster kaj Mark Fettes prelegis pri la diversaj aspektoj de internaciismo kaj naciismo. Okazis fruktodonaj laborgrupoj (i.a. pri homaj rajtoj, internaciisma agado de TEJO, lingvopolitiko) kaj diskutoj, kaj ankaŭ la du simulludoj *Albatross* kaj *Kukumio* prilumis la temon el la soci-kultura resp. lingvopolitika angulo. Krome la partoprenantoj povis dum ekskurso konatiĝi kun la Konsilio de Eŭropo, ĝui distran vesperan programon kaj gustumi lokajn specialaĵojn en strasburga restoracio. La profiton de la seminario oni vidas ĉefe ĉe la seminarianoj mem. Nunaj kaj evtl. postaj kunlaborantoj de TEJO verŝajne lernis ion kion ili poste povos utiligi. Je la fino eblis indiki intereson pri konkretaj agadkampoj en la listo de partoprenantoj – tion plej multaj faris.

### 5.2. IJF Cavallino, aprilo 2000

La 24a Internacia Junulara Festivalo "Ĉu esti aŭ ne esti Eŭropano?" (19-24.04.2000 en Cavallino/Italio) estis samtempe seminario pri eŭropa integriĝo, subtenata de Eŭropa Junulara Fondaĵo (EJF). Aliĝis pli ol 300 partoprenantoj – inter ili multaj unuafoje – tiel ke tiu ĉi IJF estis pli granda ol kutime. Por la seminaria parto TEJO invitis la konatan interlingviston Detlev Blanke, kiu prezentis prelegserion "Junaj eŭropanoj por egaleca lingvopolitiko – ĉu ni estas pretaj por taŭgaj proponoj?". Anna Ritamäki prelegis pri la eŭropaj instancoj kaj pri KER kaj gvidis diskutgrupon. La jam tradicia studsesio de AIS kun prelegoj de Renato Corsetti, Reinhard Fössmeier kaj Carlo Minnaja donis aldonan dimension al la pritrakto de la temo, kaj ankaŭ partoprenantoj kontribuis per prelegoj. Kompreneble ankaŭ eblis amuziĝi per multaj distraj programeroj kiel ekz. teatraĵoj, danckursoj kaj diskejo, en la trinkejo prizorgata de KoToPo, aŭ sur la proksima plaĝo. Raporto pri la seminario nun estas preparata.

La sukceson de IJF oni ankaŭ povas vidi en bona kunlaboro inter TEJO- kaj IEJ-teamoj.

**5.3. Varna, septembro 2000**

La dulingva TEJO-trejnseminario "Balkana junularo por kulturo de paco" (01-08.09.2000 en Varna/Bulgario; subtenata de EJF) baziĝas sur longjara laboro de esperantistoj por interkompreniĝo trans naciaj limoj, kaj sur la sperto de TEJO pri la organizado de seminarioj pri aktualaj temoj. Ĝi estos unika okazo trejniĝi kaj spertiĝi pri Balkanio, sed ankaŭ pri TEJO. Samtempe okazos Esperanto-kurso por lokaj komencantoj.

## 6. Informado

**6.1. Interna informado – Interreto**
Raportas Sjoerd Bosga, Prezidanto

Tre aktive uziĝis la dissendolisto de la estraro, bedaŭrinde ĉefe nur de estraranoj kaj la volontulo. La listo de la komitato estis ĉefe uzata por informoj *al* la komitato, de la estraro kaj aliaj, bedaŭrinde apenaŭ por diskutoj en la komitato. Tio eĉ pli forte validis por la listo de tejo-komisiitoj.

Komence de 2000, la administrado de la listoj transiris al alia programo (majordomo), kio kaŭzis transirajn problemojn, kaj ne jam plene eluziĝas la eblecoj de tiu nova solvo. En interreto aperis la kompleta regularo pri TEJO kaj la reglamentoj, kaj aperis retpaĝoj pri seminarioj kaj la IJK. Tamen krome okazis maltro da ĝisdatigoj kaj aldonoj, tiel ke urĝe bezonatas labori pri tio. Novaj kunlaborantoj estis serĉataj, sed ne sufiĉe. Antaŭvidatas reciprokaj ligoj kun la novaj paĝoj de UEA.

**6.2. Informado al ekstero**
Raportas Vladka Chvátalová, Ĝenerala Sekretario

En tiu ĉi kampo bedaŭrinde ne okazis multo. Aspektoj de informado al ekstero tamen estis ofte pridiskutataj dum la estrarkunsidoj kaj ankaŭ dum la jaro rete. Ni konscias pri manko de bonaj informmaterialoj ĉefe en la angla, sed ankaŭ aliaj lingvoj, necesus ekz. havi okulfrapan afiŝon por informstandoj kaj novan version de kajero pri TEJO-agado, kiu en 1995 pretiĝis en la TEJO-oficejo en Bonn. Nia tasko do estas serĉi kunlaborantojn kaj serioze ekokupiĝi pri la problemo.

## 7. Eldonaĵoj

**7.1. Pasporta Servo**
Raportas Ilja De Coster, Kasisto, kaj Derk Ederveen, Administranto de PS

La listo de gastigantoj de TEJO, Pasporta Servo (PS), ankaŭ en la jaro 2000 aperis ĝustatempe. Ankaŭ la ĉi-jara eldono estas rekorda sukceso, enhavante 1075 adresojn en 76 landoj. La libreto, en rozkolora kovrilo, aperis en 1600 ekzempleroj. Per la libro eblas senpage

tranokti ĉe la gastigantoj, tiel ke vi kaj povas bone praktiki Esperanton, kaj ĝui lokan kulturon. Krome, PS estas bonega varbilo.

Bedaŭrinde, la rekorda nombro da gastigantoj negative influis la financan situacion de Pasporta Servo, kiu tute dependas de vendado de la adreslibro. Ene de kelkaj jaroj la nombro da gastigantoj kreskis je 50%. Sed ĉar ĉiu gastiganto senpage ricevas la adreslibron, la afrankoj kreskis je sama procentaĵo, dum krome la enspezoj de vendado malkreskis je komparebla procentaĵo. La TEJO-estraro rapide ekagis per elekto de malpli kosta presejo, Bambu el Bulgario, kiu faris mirindan laboron. Aldone, ni iom reduktis afrankojn per la ebleco de retpoŝta konfirmo. Tamen necesas pli, kaj pro tio, por la venonta eldono, TEJO-estraro interalie esploras la eblecojn de pagitaj anoncoj en Pasporta Servo, kaj la nomumo de respondeculo pri 'eksteraj rilatoj' de Pasporta Servo, por tiel pligrandigi enspezojn el anoncado kaj vendado. TEJO intencas kiom eble teni la nunan sistemon, tio estas ne altigi la prezon de Pasporta Servo, kaj ne ŝanĝi la sistemon de senpaga sendado al gastigantoj.

Pasportan Servon administris kaj kompiladis ankaŭ ĉi-jare Derk Ederveen el Nederlando, kun la helpo de Jeroen Balkenende, kiu prizorgis la programadon. Ĉi-teamo jam dum pluraj jaroj faras tiun laboron. Ĉi-loke la estraro volas ilin danki por ilia bona laboro. Ankaŭ la pli ol 1000 gastigantojn ni ĉi tie dankegas.

**7.2. Kontakto**

Raportas Sjoerd Bosga, Prezidanto, kaj Sabira Ståhlberg, redaktoro de Kontakto

Dum la jaro Kontakto aperis regule kaj bonorde. Kompare al antaŭaj jaroj, ĝi pli traktis temojn, kiuj havas nerektan rilaton kun TEJO, kiel temoj de TEJO-seminarioj. Kromaj temoj i.a. rilatis al aktualaj temoj en la mondo. Kontakto sukcesis ofte prezenti temojn el la vidpunkto de tiuj, kiuj plej spertas pri ili – kiel ekzemple en tema numero pri Irano, en kiu irananoj mem prezentis sian landon.

Dume ankaŭ la ekstera aspekto de la revuo pliboniĝis. Dume la estraro pli envolviĝemas en Kontakto, vidante en ĝi grava ero de disvastigenda laborkampo de TEJO: agado *per* Esperanto por socio kaj kulturo. Kadre de siaj kunsidoj, la estraro esprimis siajn laŭdojn por la redaktoro, Sabira Ståhlberg.

**7.3. TEJO Tutmonde**

Raportas Ilja De Coster, Kasisto, kaj Rick Newsum, Redaktoro de TT

TEJO Tutmonde (TT), la oficiala gazeto de TEJO, ankaŭ en ĉi periodo estis redaktata en Britio fare de Rick Newsum. TT aperas je 1500 ekzempleroj. La enhavo daŭre estis laŭeble plej varia pri la junulara Esperanto-movado. Tamen, pro pluraj kialoj, TT ne sukcesis regule aperadi. Grava problemo estis la manko de kontribuoj kaj malfrueco de kontribuoj, pro kiuj la redaktoro kelkfoje devis prokrasti la prespretigon. Montriĝis ĉi-jare ankaŭ problemo pro miskompreno pri administrado de TT-eldonado inter la diversaj homoj, kiuj agas tiurilate.

Ni konstatas ke TT ne jam sufiĉe eluziĝas kiel ĉefa organo de TEJO, per kiu niaj Landaj

Sekcioj kaj niaj membroj povas interŝanĝi informojn kaj ideojn pri la movado. Pluraj Landaj Sekcioj ankoraŭ ne trovas la vojon al TT por informi al la tuta mondo pri propra agado. Tamen TT estas unu el la plej efikaj iloj por atingi la tutan TEJO-membraron. Tial ekestis la ideo restarigi reton de regionaj redaktoroj, kiel ekzistis en la 80-aj jaroj. Tiuj regionaj redaktoroj en la propra regiono kolektu kontribuojn, tiel helpante la redaktoron kaj pliriĉigante la enhavon de la revuo. La celo de ĉi regiona reto unuavice estas plibonigi la informadon pri kio vivas en niaj diversaj Landaj Sekcioj en la diversaj kontinentoj. Estas intenco serĉi regionajn redaktorojn pere de kontaktoj inter estraranoj kaj komisiitoj kiuj okupiĝas pri landa agado, kaj aktivuloj en Landaj Sekcioj. Tamen malmultis progreso pri tio, precipe pro kialoj klarigitaj en parto 3.1.

Alia konkreta ideo estas liberigi en ĉiu numero paĝon, kie iu Landa Sekcio povas sin prezenti al ĉiuj aliaj membroj de TEJO. Se vi interesiĝas pri ebleco iĝi landa redaktoro, aŭ vi konas iun kiu interesiĝus, ne hezitu kontakti la TT-redaktoron (adreso: vidu TT, paĝo 2). Rekta retadreso de la TT-redaktoro estas <tejo-tutmonde@esperanto.org>.

La estraro volas ĉi-loke danki al Rick kaj pluraj aliaj kontribuintoj por ilia bona laboro.

## 8. Kongresoj

Raportas Holger Boos, Estrarano pri Kongresoj

### 8.1. Ĝenerale

La ĝenerala strebo estis, krom la komunikado kaj interkonsentiĝoj kun LKK-j, enkonduki novajn elementojn en la agadon pri kongresoj kiuj estis planataj dum la pasintaj jaroj. Ĉiuj agadoj estu parto de manlibro pri kongresoj kiu povas servi kiel gvidilo por novaj aktivuloj en tiu ĉi fako. La rimarkebla manko de kunlaborantoj, tamen, ege malfaciligas la ĝeneralan laboron.

### 8.2. IJK 1999 Veszprém

La IJK okazinta en Hungario estis tre verŝajne la plej granda en la naŭdekaj jaroj – “tre verŝajne” ĉar bedaŭrinde ankoraŭ ne alvenis la finkalkuloj de la kongreso. Ĉefe kulpas pri tio la tempomanko de la hungaraj respondeculoj. Laŭ la plejlasta informo oni momente (meze de majo) prilaboras ĝin. Ĉiukaze la kongreso, kiun partoprenis ĉirkaŭ 600 partoprenantoj, el ĉiuj vidpunktoj estis sukcesa, kun riĉa programo kaj bonega etoso.

### 8.3. IJK 2000 Honkongo

Multaj demandoj estis nerespondítaj pri tiu ĉi IJK kiam la nova estraro transprenis la laboron somere, pro tio iom suferis la informado kaj precipe la publikigo de la aliĝilo kiu prokrastiĝis ĝis la fino de 1999. Tiam, tamen, bonŝance la plej multaj aferoj kun iom da peno de ĉiu flanko estis priinterkonsentitaj.

Precipe utila estis vizito de Sjoerd kaj Holger en Ĉinio en oktobro kiam eblis interkonatiĝi kun la LKK kaj la urbo, rigardi ejo-kandidatojn kaj ekhavi pli bonan impreson pri la situacio.

Nun la organizado funkcias sufiĉe glate kaj bone kunordigite. Pro la granda distanco de Eŭropo kaj tamen daŭre sufiĉe altaj vojaĝkostoj atendeblas relative malalta nombro de partoprenantoj, verŝajne ne multe pli ol 150. Estas rimarkinde en tiu ĉi rilato ke membroj de TEJO kaj de UEA male al antaŭaj IJK-j ricevas rabaton kompare al ne-membroj. Ekzistas kelkaj antaŭ- kaj postaranĝoj; precipe menciindas komuna trajna vojaĝo de Moskvo tra Siberio, Mongolio kaj Pekino al Honkongo.

Dum sia vizito al Pekino maje 2000 Sabira Stahlberg, redaktoro de Kontakto, kontaktis kun la tieaj anoj de la LKK de la IJK en Honkongo, kaj subtenis ilian agadon nome de TEJO.

**8.4. IJK 2001 Francio**

La estraro provizore akceptis la proponon de JEFO por la IJK 2001 en Strasbourg – provizore nur pro kelkaj klarigendaj detaloj ĉefe financaj. La temo estas ankoraŭ ne tute fiksita sed certe kongruos kun internacie aktuala temo kiel unu el la jarotemoj de UN aŭ de EU – tiel estas rilato al nia eksterrilata laboro. Oni atendas ĉirkaŭ 300 partoprenantojn kaj por tiu ĉi kongreso ni volas la unuan fojon apliki pli justan kotizsistemon ĉefe baziĝantan sur la rekomendoj de la tiucela TEJO-komitata laborgrupo. La kongresurbo ebligas kelkajn specialajn programerojn, ekz. rilate la Eŭropajn instituciojn kaj la proksimecon al Germanio. Menciindas aparte planata strata festivalo malferma por ĉiuj Strasburganoj. La LKK estas tre internacia, kun anoj el Francio, Germanio, Nederlando kaj Norvegio. Antaŭvidita dato estas la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2001, do unu tagon post la fino de la UK en Zagreb.

**8.5. IJK 2002**

Estas momente du landaj sekcioj kiuj konsideras sian kandidatiĝon. Post peto de TEJO konsideri kandidatiĝon eklaboris anoj de BEJO por okazigi la IJK-n en Brazilo, antaŭ aŭ post la UK. Unuaj preparoj komenciĝis sed ankoraŭ neniu oficiala kandidatiĝa dosiero pretas. Interesiĝon okazigi la IJK-n en tiu ĉi jaro esprimis ankaŭ ULEJ (Ukrainio). Tie momente estas simile lozaj unuaj antaŭpreparoj, kaj same ankoraŭ ne okazis oficiala kandidatiĝo.

**8.6. IJK 2003**

Anoj de NEJ maloficiale esprimis interesiĝon okazigi la IJK-n en Nederlando tiujare. Tamen, nenio konkreta ankoraŭ estas konata.

**8.7. IJK 2004**

Pro speciala kultura somera programo en Barcelona 2004 interesiĝas KEJ okazigi la IJK-n tiam tie.

## 9. Financoj

Raportas Ilja De Coster, Kasisto

**9.1. Ĝenerale kaj financa ordigado**

Post la problemoj de la lasta jaro, nova kasisto eklaboris por iom post iom solvi la

ekzistantajn problemojn. Tio ĉi evidentiĝis multe da laboro, kiu ne jam tute finfariĝis kaj por kiu bonvenas pliaj homfortoj. En la kasista laboro multe helpis i.a. Danny ten Haaf, komisiito pri subvencioj, kaj Anna-Lenna Eriksson, la antaŭa kasisto.

**9.1.1. Nova kontara sistemo**

La unua paŝo estis la kreado de nova kontara sistemo, nome la sistemo por grupigi, resumi kaj detaligi la diversajn spezojn. Post iom da provoj nun ekzistas kaj funkcias la nova sistemo, kiu post kelkaj jaroj tamen bezonos valorretaksadon. La esenca filozofio de la nova sistemo estas la detaligo po agada fako, tiel ke ni povas havi pli bonan komprenon de la financaj strukturoj de niaj diversaj agaderoj. Sekve ekz. KER, LA, Informado, Seminarioj, ĝenerala funkciado,... estas klare aparte videbla en la financa raporto. Ĉi kontara sistemo estu la bazo de nia financa administrado. La financa jarraporto de 1998 (vidu sube) jam fariĝis laŭ ĝi.

**9.1.2. Finaranĝo de dosieroj el pasinto**

Plia grava parto de la laboro estas la eltrovo kaj finaranĝo de diversaj ŝuldoj kaj postuloj kiujn TEJO havas de la lastaj jaroj. Pro la malkontinueco en la financa fako ĉi aferoj iĝis malpli klaraj. Pluraj dosieroj ĉi teme intertempe solviĝis, por kelkaj ankoraŭ okazu la efektivigo de transpagoj.

Ĉefe temas pri financaj rilatoj inter TEJO kaj ĝiaj LS-oj. Gravaj dosieroj estas i.a. subvencio por Disseminario 1997 en Italio (solvita), TEJO-Seminario Torino 1999 (solvita), subvencio KEF 1998 (solvita), financoj de nia iama Eŭropa Oficejo BonnEjo (daŭre solvata) kaj financaj fintraktadoj de la lastaj IJK-oj (krom Veszprém ĉiuj solvitaj). Indas ĉi tie speciale danki nian italan LS-on kiu pretis multon elspezi por TEJO kaj konsentis nur poste ricevi la ŝuldon de TEJO.

Aliaj dosieroj ĉefe temas pri ŝuldoj al aŭ postuloj je individuaj aktivuloj, ankaŭ ĉi dosieroj grandparte solviĝis. Ankaŭ ĉi tie indas danki la plurajn aktivulojn kiuj pretis donaci al TEJO.

Plia parto estas la finfarado de raportoj al KdE-EJF, nia ĉefa subvencianto, rilate al TEJO-KER Seminarioj organizitaj per EJF-subvencio. La neatentado pri raportado antaŭ la regulara templimo kaŭzis problemojn pro kiu ni ekz. perdis subvenciojn. Temis pri niaj seminarioj en Eŭskio kaj Torino, ambaŭ raportoj intertempe sendiĝis. Alia seminaria subvenciproblemo estis subvencipeto al EJF por IS, la ĉiujara novjara renkontiĝo de GEJ, kiun GEJ tamen ne rajtis uzi. Ĉi problemon ni solvis uzante la subvencion por la IJF 2000, ĉiujara aranĝo de IEJ, kiu ĉi jare estis organizita de IEJ kaj TEJO kune. Tiel ni ebligis malpli altajn kotizojn, partan repagon de vojaĝkostoj de partoprenantoj kaj pli ampleksan programon.

**9.1.3. Kasista trejnado**

Plia grava afero por la nova kasisto certe estas lerni pri kiel funkcias aŭ funkciu la diversaj eroj de la TEJO-financoj. Temas ĉefe pri pluraj teknikaĵoj. En ĉi kampo mi intertempe certe multon lernis, tiel ke kelkaj aferoj jam pli glate funkcias ol komence. Tamen pro amaso da sciindaĵoj ankoraŭ multe lernendas, kio certe poiomete efektiviĝos.

Por eviti ke sekvaj kasistoj denove ekde nulo ĉion eklernu, mi lernante kaj eltrovante aferojn samtempe kolektas la lernitaĵojn en manlibro por TEJO-kasistoj. Ĝi nun estas tute ĥaosa dokumento, sed la celo estas ke mi povu transdoni decan redaktitan version al mia posteulo.

### 9.1.4. Financa regularo

Por pli glatigi la administradon kaj la financajn rilatojn kun la aktivuloj, mi ellaboris financan regularon. La estraro principe akceptis la regularon dum ĝia kunsido en novembro 1999. La celo estis ĝin publikigi kun aldonaj klarigoj pri kiel aktivuloj petu kostrekompencojn kaj antaŭpagojn, kiel ili plenigu formularon ktp. Provversio de ĉi lasta jam ekzistas, sed pro tro da laboro ĝi ne finpretiĝis kaj sekve ne jam publikiĝis. Tial la regularo ne jam plene aplikiĝas, kvankam praktike la kostrekompencado jam funkcias kiel priskribas la regularo. Mi esperas la aferon eldoni komence de 2001, kune kun aliaj manlibroj por aktivuloj.

### 9.2. Financa Raporto

En ĉi jarraporto ni nur povas prezenti la financan raporton de 1998, kiu normale devis prezentiĝi jam dum la Komitatkunsido en Veszprém. Pro la amaso da laboro ne jam povas prezentiĝi la raporto de 1999. Provizoraj ciferoj jam ekzistas, sed pro neebleco jam kompari kun 1998 ne indas jam nun publikigi ilin. Por plifaciligi la ontan komparadon la ciferoj de 1998 jam estas en eŭroj.

En la sekvaj subĉapitroj vi ricevas bazan superrigardon pri la financa strukturo de TEJO por 1998, baze la rezultkalkulo kaj la bilanco. Pli detalajn ciferojn kaj informojn eblas ricevi laŭ peto ĉe la kasisto, komitatanoj ricevos plian detaligon komitatkunside.

### 9.2.1. La rezultkalkulo de 1998

Trarigardo de la rezultkalkulo, kie montriĝas niaj en- kaj elspezoj, montras ke por 1998 TEJO registris etan profiton de 485,28 EUR. Sumaj elspezoj estis 64471,58 EUR, dum sumaj enspezoj estis 64956,86 EUR.

Ĉefaj elspezoj estas la Ĝenerala Funkciado (53%), Seminarioj (30%), KER (8%), kaj niaj Eldonoj (3%). La rubriko Ĝenerala Funkciado ĉefe konsistas el la funkciado de la Oficejo en Roterdamo (41%), funkciado de la Estraro (16%), la eldono de nia revuo TEJO Tutmonde (16%), kaj poŝmono kaj vivkostoj de la TEJO-volontulo (11%). Ĉefaj enspezoj estas la Ĝeneralaj Rimedoj (47%), Seminarioj (32%), Eldonoj (8%) kaj IJK licencpago (6%). La rubriko Ĝeneralaj Rimedoj ĉefe konsistas el Kotizoj (61%), Subvencioj (32%) kaj Donacoj (4%).

Kelkajn nuancigojn endas aldoni. Unue, pro tio ke nia oficejo laboras por niaj diversaj agadfakoj, ĝiaj altaj kostoj rilatas al diversaj agaderoj. Tamen praktike ne eblas disdividi ĉi kostojn laŭ la koncernaj rubrikoj. Tial ili simple kunmetiĝis en la rubriko oficejo. Due, la seminarioj (granda ero de la spezoj) grandparte estas aŭtonoma ero en la spezoj, kio ĉefe estas danke al la apartaj subvencioj. Rimarku ankaŭ ke la rubriko Eldonoj ne enhavas nian revuon TEJO Tutmonde, kiu apartenas al la Ĝenerala Funkciado, sed ĉefe Pasportan Servon kaj Kontakton (kiu tamen ne plene aperas en la TEJO-spezoj pro tio ke UEA ĝin nun eldonas),

ankaŭ aperas iom da aliaj aferoj en ĉi rubriko, kiel ekz. libroj kaj T-ĉemizoj.

La spezkontoj al ni montras ke KER kaj Informado estas niaj ĉefaj elspezaj agaderoj. Tio ĉi normalas, ili ja estas niaj agaderoj kiuj bezonas financiĝi per aliaj agaderoj. Niaj ĉefaj enspezaj (profitdonaj) agaderoj estas Eldonoj kaj IJK, kaj iomete niaj seminarioj. Nia Ĝenerala Funkciado estas elspezeta. Tio ĉi konkrete pruvas ke TEJO finance ne travivus sen ĝia (enspeza) agado, kiel ni ĉiuj jam supozis.

La resuman rezultkalkulon de 1998 vidu aldone.

### 9.2.2. La bilanco por 1998

El la bilanco, kiu montras la havaĵojn kaj ŝuldojn de la organizo, ni lernas ke la TEJO-kapitalo ĉefe kuŝas en kontoj. Ĉe la Aktivoj la bilanco montras sumajn monrimedojn de 25016 EUR, el kiu plej granda parto (17658 EUR) estas blokata en ŝpar- aŭ rezervaj kontoj. TEJO apenaŭ havas fiksajn aktivojn. Ni havas kelkajn komputilojn kaj aliajn buroajn ilojn, sed ili jam malnoviĝis kaj do – krom simbole – ne plu aperas en la bilanco. En la pasiva flanko ĉefe rimarkindas la rezervoj kiujn havas TEJO. Temas pri la rezervoj Dumvivaj Membroj, IJK kaj kulturaj konkursoj, sume por 18405 EUR. Ĉi rezervoj ne estas tuŝeblaj por nia agado, sed donas al ni ian enspezon aŭ garantion kaze de financaj problemoj. Kompare kun lastaj jaroj la rezervoj malaltiĝis, ĉefe pro deficitaj IJK-oj, kio ne estas bona signo. Gravas ankaŭ ke por fintraktado de kelkaj dosieroj el pasinto (vidu supre) flanken metiĝis antaŭvido 5445 EUR. Krom ĉi antaŭvido TEJO ne havas ian ajn ŝparpoton. Bona konstato estas ke TEJO ne havas grandajn ŝuldojn.

La resuman bilancon de 1998 vidu aldone.

### 9.3. Financa politiko por TEJO

Ne sufiĉas ordigi la financan administradon, sed tio jes estas necesa bazo por io alia: nome bona financa politiko. Financa politiko signifas (longtemplima) planado de en- kaj elspezoj kadre de nia agado. Ĝia celo estu kreo de sana financa bazo kun sufiĉe da liberaj financaj rimedoj por povi realigi bonan agadon, kongrue kun la asociaj celoj. La ellaborado kaj efektivigo de la financa politiko ŝajnas al mi la ĉefa tasko de la kasisto. En la kampo de financa politiko ankoraŭ multe farendas, por kiu bezonatas pli da kunlaborantoj (vi estas invitata). Sekvas resumo pri la nunaj stato kaj ideoj.

### 9.3.1. Levi enspezojn

Grava metodo por liberigi pliajn monrimedojn evidente estas levi la enspezojn. Diversaj vojoj por tio ekzistas.

Unue ni devus pli sisteme eluzi la ekzistantajn subvenciojn kaj konstante eltrovi novajn. Bonus por tio ekhavi plian apartan komisiiton, ĉar subvenciaj aferoj tiom kompleksas ke la kasisto mem ne povas detale pri ili okupiĝi.

Sed ni ne rajtas nur fidi je subvencioj, ni ankaŭ mem kreu enspezojn. Vidinte ke niaj eldonoj estas grava enspezfonto, unu ebleco certe estas la pli vigligo de nia eldona agado. Indas pripensi kiajn pliajn eldonojn TEJO povus fari kadre de sia agado. Kelkaj homoj cerbumas pri tio momente, sed ankaŭ ĉi tie bezonatas homfortoj, ĉefe por realigi la ideojn.

Dua ebleco, pri kiu la estraro jam principe konsentis, estas la ebligo de reklamoj kaj anoncoj en en niaj publikaĵoj (TT, PS, kongreslibroj). Kvankam ni konscias ke ni tiel ne povos kolekti grandajn sumojn, la pliaj enspezoj el tio povus esti interesaj. Por tio ĉi ni serĉas homojn kiuj, kontraŭ makleraĵo, pretus alporti pagajn anoncantojn.

Sed evidentas ankaŭ la altigo de la membroenspezoj. Bedaŭrinde en la lastaj jaroj TEJO devis alfronti falon de membronombro, kio evidente ankaŭ havas konsekvencojn por la enspezoj. Aktiviĝu la membrovarbado. Ankaŭ indas aparte atenti pri la varbado de patronoj, kiuj gravege finance subtenas TEJO-n.

**9.3.2. Bremsi elspezojn**

Ni ankaŭ konstante penu ne tro kaj pli racie elspezi. En nia eldona kampo ni jam faris gravan paŝon tiu direkte. Trovinte alian eldonejon ni sukcesis malaltigi la pres- kaj dissendkostojn de la Pasporta Servo eldono 2000, tenante saman vendprezon. Tio signifos nete pli altan enspezon. La antaŭaj eldonoj de PS kutime estis iomete malprofitaj, malgraŭ ke ne ĉiam eblis ekzakte kalkuli tion. Por nia revuo TT mi esperas en la sekva periodo fari la samon. Mi ankaŭ ripete petas niajn aktivulojn atenti kaj dufoje pensi antaŭ fari iun elspezon, kaj ĉiam serĉi malpli kostajn variantojn.

**9.3.3. Ŝpari por investi**

Por povi bonigi nian agadon ni kelkfoje devos fari gravajn investojn, ĉu modernigante nian oficejon, ĉu lanĉi iun varbkampanjon, ĉu organizante iun gravan eventon. Tiuj investoj longtemplime donos al ni pliajn enspezojn, ĉu mone, ĉu ne mone realigante niajn celojn. Por tion fari ni bezonas havi grandan ŝparkeston el kiu ni povas preni la bezonatan monon. Ni nun tute ne havas tian keston, tial mi proponis al la estraro eki ŝparpolitikon por krei ĝin.

**9.3.4. Elekti prioritatojn**

Certe la monrimedoj de TEJO ĉiukaze restos limigitaj. Sekve ni ne povos ĉion ajn fari kion ni volus kaj devos elekti prioritatojn kaj finance traduki tion. Por 2000 tian ekzercon faris la estraro en ĝia kunsido de marto 2000 decidante pri la buĝeto. Per la libera buĝeto de 5086 EUR, la estraro decidis pri la jenaj prioritatoj: Nia seminario en Varna (Bulgario, septembro 2000): 2000 EUR, plia volontulo en CO dum unu monato: 386 EUR, modernigo de la TEJO-oficejo: 500 EUR, ŝparado por investi: 520 EUR, TEJO-reprezentanto al Ĉinio (ankaŭ prepare al IJK): 300 EUR, aktivula trejnado: 200 EUR, PS kampajno por 2001: 250 EUR, Eldono de la KER-revuo Dialog': 170 EUR, Lingva Festivalo-Komisiono: 360 EUR (provizore atendante ĝian laborplanon), IJK-agado: 400 EUR. La buĝeton por 2000 vidu aldone.

Mi invitas la aktivulojn kaj la Komitaton cerbumi pri niaj prioritatoj por 2001 kaj poste.

**9.4. Demokratia financa kontrolo**

Havi bonan financan administradon kaj bonan financan politikon estas unu afero, havi kontrolon je ili alia afero. Kaj tion la kasisto evidente mem ne povas. En demokratia asocio kiel TEJO, gravas ke la plej alta organo, la Komitato, povas kontroli la asociajn financojn.

Tial la kasisto ne nur publikigas la financan raporton sed ankaŭ tenas ĉiujn financajn pruvilojn kaj dokumentojn, kaj tenas librotenadon enrigardeblan. Mi atentigas la Komitaton ke ĝi rajtas enrigardi la librotenadon kaj peti ajnajn pliajn klarigojn al la kasisto. Se la Komitato tion taksas bezonata, ĝi estas invitata nomumi revizoron. Vi certe ankaŭ estas invitata kun pridiskuti la ellaboratan financan politikon.

## 10. Trejnado/Aktivularo

Raportas Vladka Chvátalová, Ĝenerala Sekretario

Trejnado de aktivuloj restas unu el plej gravaj taskoj, kiuj staras antaŭ ni. Aperis ideo restarigi Komisionon pri Aktivula Trejnado (KAT) kaj sisteme zorgi pri spertigo de la aktivularo kaj de novuloj. Grava paŝo tamen jam okazis dum la seminario en Strasburgo (vidu 5.1.), kiam TEJO emfazis ligon de la seminaria temo kun nia agado kaj pluraj partoprenantoj ekinteresiĝis pri kunlaboro ĉefe en KER. La seminario en Varna septembre 2000 (vidu 5.3.) parte estas celata kiel trejnseminario de TEJO aparte celanta balkananojn, sed ne nur. Planataj estas specialaj trejniĝoj pri strukturo kaj agado de TEJO, kaj tiucele invititaj kiel prelegantoj estas longdaŭraj aktivuloj kaj spertuloj pri TEJO.

## Aldono

**TEJO-Rezultkalkulo** (en EUR)

| | | 1998<br>Reale | 2000<br>Buĝete |
|---|---|---|---|
| 6 | Kostoj | 64 471,58 | 47 077,50 |
| 60 | Elspezoj ĝenerala funkciado | 34017,08 | 31 697,00 |
| 61 | Elspezoj KER | 5449,11 | 6 031,00 |
| 62 | Elspezoj InfKo | 0,00 | 720,00 |
| 63 | Elspezoj Landa Agado | 44,71 | 720,00 |
| 64 | Elspezoj Eldonoj | 1694,85 | 2 870,00 |
| 65 | Elspezoj IJK | 9,98 | 1 120,00 |
| 66 | Elspezoj SeKo | 19 385,13 | 2 720,00 |
| 67 | Elspezoj aliaj agadoj | 289,43 | 460,00 |
| 69 | Aliaj elspezoj kaj teknikaj kontoj | 3 581,29 | 739,50 |
| 7 | Enspezoj | 64 956,86 | 47 077,50 |
| 70 | Enspezoj ĝen rimedoj | 30 707,61 | 32 325,00 |
| 71 | Enspezoj KER | 1 694,47 | 2 500,00 |
| 72 | Enspezoj InfKo | 0,00 | 0,00 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 73 | Enspezoj LA | 0,00 | 0,00 |
| 74 | Enspezoj Eldonoj | 4 878,25 | 8 366,50 |
| 75 | Enspezoj IJK | 4 191,67 | 1 600,00 |
| 76 | Enspezoj SeKo | 20 722,57 | 0,00 |
| 77 | Enspezoj alia agado | 0,00 | 0,00 |
| 79 | Aliaj enspezoj kaj teknikaj kontoj | 2 762,29 | 2 286,00 |

**TEJO-Bilanco** (en EUR) 1998

| | Aktivoj | 28 994,32 |
|---|---|---|
| 2 | Fiksaj aktivoj | 89,61 |
| 20 | Buroaj iloj | 89,61 |
| 21 | Investoj por agado | 0,00 |
| 22 | Postuloj je pli ol 1jaro | 0,00 |
| 29 | Fiksaj aktivoj aliaj | 0,00 |
| 3 | Stokoj | 0,00 |
| 30 | Stoko vendaĵoj | 0,00 |
| 31 | Stoko InfKo | 0,00 |
| 32 | Stoko div buroaĵoj | 0,00 |
| 4 | Postuloj je malpli 1 jaro | 2 261,65 |
| 40 | Kurantaj ŝuldoj k postuloj | 2 331,28 |
| 41 | Debitoroj | -69,63 |
| 49 | Postuloj malpli 1jaro aliaj | 0,00 |
| 5 | Monrimedoj | 25 016,67 |
| 50 | Kontoj ŝpar- kaj rezervaj | 17 658,68 |
| 51 | Kurantaj kontoj | 949,11 |
| 53 | Kasoj | 0,00 |
| 54 | Teknikaj kontoj | 6 408,88 |
| 4 | Transiraj kontoj | 1 626,39 |
| 48 | Transiraj kontoj | 1 626,39 |

| | Pasivoj | 28 994,32 |
|---|---|---|
| 1 | Propraj havaĵoj k ŝuldoj pli 1 j | 28 893,38 |
| 10 | Kapitalo | 4 557,39 |
| 11 | Rezultoprilaboro | 485,30 |
| 12 | Rezervoj | 18 405,33 |
| 13 | Antaŭvidoj | 5 445,36 |
| 14 | Ŝuldoj pli ol 1 jaro | 0,00 |
| 4 | Ŝuldoj malpli ol 1 jaro | 100,94 |
| 42 | Kreditoroj | 46,40 |
| 49 | Ŝuldoj je malpli ol 1 jaro aliaj | 0,00 |
| 48 | Transiraj kontoj | 54,54 |

**Kelkaj mallongigoj:**

| | |
|---|---|
| AIS | Akadamio Internacia de la Sciencoj, San Marino |
| EJC | Eŭropa Junulara Centro (Strasburgo, Budapeŝto) |
| EJF | Eŭropa Junulara Fondaĵo |
| IJK | Internacia Junulara Kongreso (aranĝo de TEJO) |
| KdE | Konsilio de Eŭropo |
| KER | Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO |
| LA | Landa Agado |
| LS | Landa Sekcio |
| TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo |
| TT | TEJO Tutmonde |
| UEA | Universala Esperanto-Asocio |

**Noto:** Ĉi tiun raporton finverkis kaj finredaktis Vladka Chvátalová la 9-an de junio 2000.

# Pri komputiloj kaj multe pli

**La seminario Esperanto@Interreto-2000 ŝajne plaĉis al ĉiuj partoprenantoj! Eĉ teamo de svedia televido aperis kaj bonraportis pri Esperanto kaj la seminario.**

La semajno de E@I (elparoliĝas "E ĉe I") rapide pasis kaj eblas nun konstati ke 'la fortoj' bele estis kun ni dum la aranĝo! Dum la tuta semajno estis agrabla kaj amika etoso inter la 21 partoprenantoj de Pollando, Litovio, Svedio, Rusio, Danlando kaj Norvegio. Spertigis ilin pri interretaĵoj kelkaj el la plej interesaj, spertaj pri komputilaĵoj prelegantoj en Esperantio.

Ekzemple Bertilo Wennergren prelegis pri HTML, UniRed (tre inda redaktilo, www.esperanto.mv.ru/UniRed/) kaj Signokodoj; Franko Luin rakontis pri siaj spertoj de 'esperanto.se' kaj 'esperanto.nu'; Henning von Rosen belprelegis pri la rilato inter homlingvoj kaj komputillingvoj; Ralf Frölich gvidis diskuton pri strategioj por Interreto kaj Fredrik Marcus de la ttt-firmao *Razorfish* montris kiel la estonteco de Interreto povus aspekti.

*Razorfish* (www.razorfish.com) estis unu el la subvenciantoj de la seminario, alia estis ŝtata organizo prijunulara. Pro tiu subteno eblis okazigi la seminarion ĉe Tollare popolaltlernejo, belega loko 20 minutojn for de la centro de Stokholmo, kaj repagi vojaĝkostojn al tiuj kiuj bezonis tion.

Krom bona koncerto de Persone la distra programo enhavis 'internacian vesperon' kun diversnaciaj muziko kaj frandaĵoj, amuzajn ludojn kaj naturekskursetojn. Kelkaj psikologiaj ludoj kiujn gvidis Nastia Koĵevnikova multe helpis nin interamikiĝi.

Dum la seminario ni ankaŭ pridiskutis kiel daŭrigi la laboron kaj estis decidite ke venontjare ni provu okazigi similan aranĝon, verŝajne kun fokuso je iu speciala temo, eble Esperanto-kursoj interagaj. Alia ideo estas starigi malfermfontan projekton por esplori la rilaton inter Esperanto kaj altnivela programlingvo kiel Pitono (www.python.org). Pli da informoj pri E@I kaj novaĵoj troveblas je: http://www.esperanto.se/echei.

**Hokan@Esperanto.nu**
**tre kontenta seminarikunordiginto**



Simono el Danio, Dovile el Litovio, Lovisa, Hokan kaj Henning el Svedio

# Konatiĝu kun *Gaudeamus*

**_Gaudeamus_, kiu ekis en 1997, celas krei kaj efektivigi sociajn programojn, direktitajn al la harmonia evoluo de la homo en la socio, kaj de la socio mem.**

Internacia Junulara Krea Unuiĝo *Gaudeamus* estas neformala, volontula organizo. Ĝia inicianto kaj motoro estas fama poeto, komponisto kaj organizanto de internaciaj kulturaj projektoj Vladimir Soroka. La laborlingvo de la Unuiĝo estas Esperanto.

*Gaudeamus* kunlaboras kun homoj kaj organizoj sendepende de iliaj rasaj, naciaj, politikaj, religiaj kaj aliaj difinoj. Ĝi subtenas tiujn fortojn, kiuj estas direktitaj al konservo kaj evoluo de bonaj interpopolaj rilatoj, iliajn spiritan kaj kulturan kreskadon. *Gaudeamus* konsistas el Krea Laboratorio kaj Organiza Centro (Volontula Centro).

Nun *Gaudeamus* efektivigas sian unuan Programon: "Internaciaj Kontaktoj" (IK), kiu estis prilaborata dum la lastaj 2,5 jaroj. Programo IK estas unuigo de diversaj interligitaj projektoj: inform-kleriga, kultura, ekonomi-entereprena kaj aliaj, direktitaj al kreado de novaj kondiĉoj por facilaj kaj efektivaj interpopolaj rilatoj. IK baziĝas sur posedo kaj uzado de Esperanto far IK-partoprenantoj.

La unua inform-kleriga projekto de IK nomiĝas "Internacia Junulara Esperanto-Karavano" (IJEK). La slogano de Projekto IJEK estas "Al junularo de Tero – komunan lingvon!". La Projekto celas:

1. informi junularon pri la eblecoj kaj avantaĝoj kiujn ricevas homoj posedantaj la lingvon, kaj pri la projektoj "Studenta Babilono", "ART-Babilono", kaj aliaj;
2. krei Volontulajn Centrojn en diversaj landoj kiel bazon por efektivigo de la sekvaj projektoj;
3. altiri atenton de gazetaro al la lingva problemo kaj al Esperanto, kiel ĝia solvo.

Por esplori speciale preparitan por tiuj ĉi celoj teknologion, la Organiza Komitato jam sukcese okazigis plurajn aranĝojn en urbo Kijivo (Ukrainio): gazetar-konferencojn, seminarojn, lecionojn, koncertojn, renkontiĝojn, prezentadojn, k.t.p. La ĉefaj partoj de la Projekto pasas en formo de renkontiĝoj de famaj esperantistoj kun la studenta junularo. Dum la renkontiĝoj sonas rakontoj pri Esperanto, la movado, tendencoj en ĝia evoluo ktp.

Bone efikas la Karavanaj rimedoj: belaj diverskoloraj afiŝoj surstrate, en metroo kaj en universitatoj, anoncoj en radio kaj televido. La Organizantoj de IJEK kontaktas ne nur studentojn, sed ankaŭ politikistojn, ĵurnalistojn, artistojn, komercistojn kaj aliajn sociajn tavolojn.

Estis kreitaj Prepar-lingvistika programo "Septima" kaj Ukrainia filio de Volontula Centro de *Gaudeamus*. La tuta laboro de la Volontula Centro estas dividita je malgrandaj taskoj, kiuj estas facile plenumataj de 50 volontulaj helpantoj. Ĉi tiu laboro estas gvidata de spertaj reprezentantoj de *Gaudeamus* persone. Laŭdezire la volontuloj havas eblon iĝi reprezentantoj de *Gaudeamus*. Por tio ili trapasas specialan kurson.

*Gaudeamus* planas karavani dum 2 jaroj tra 82 landoj, disvastigante sian sperton. Dezirantoj kaj interesiĝantoj estas bonvenaj.

Ekzistas ebleco mendi reprezentanto(j)n de *Gaudeamus* por ajnlanda Esperanto-organizo por fari similan laboron en siaj landoj. Por tio bezonatas invitilo, loĝado por minimume unu reprezentanto dum almenaŭ unu monato.

**Mikaelo Lineckij** (lineckij@esperanto.nu)
**Informa centro de IJEK**
**p.k. 140, Kijivo-201, UA-04201**

# Bunta Esperantio!

*julio*

**17-23.7:** Kultura E-Festivalo 2000, Helsinki. Inf: KEF 2000, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Rete: kef2000@esperanto.fi

**22-25.7:** Antaŭkongreso en Jordanio kun seminario: "Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj". Inf: UEA, NL-3015 BJ Rotterdam, Nieuwe Binnenweg 176, Nederlando. Tel: +31-10-436144, +31-10-4361751. Rete: uea@inter.nl.net

**25.7:** Seminario en "Pac-oazo/Neve ŝalom", Israelio. Inf: LKK, pk. 1289, IL-61012 Tel Aviv, Israelio aŭ UEA (vidu 22 -24 julio)

**25.7-1.8:** 85-a UK en Tel-Aviv. Inf: LKK, pk. 1289, IL-61012 Tel Aviv, Israelio aŭ UEA (vidu 22 -24 julio)

**25.7-1.8:** I-nacia Infana Kongreseto, Hadassim, Israelo. Inf: Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2., HU-2030 Érd, Hungario. Tel: +36-1-4523737, faks: +36-1-4523710. Rete: stefan.macgill@galamb.net

**27.7-2.8:** I-nacia Junulara Semajno. Inf: Hungara E-Junularo, pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. pandan@mail.matav.hu

*aŭgusto*

**1-8.8:** Postkongresa Ekskurso: La plej bono de Israelo, Esperanto-Vojaĝservo, Rete: LusiHarmon@aol.com

**2-13.8:** MEmzorga LAgumado, Délegyháza (ankaŭ antaŭ-MELA, 22-27.7). Inf: Laca Garamvölgyi, Arany János út 47, HU-1221 Budapest, Hungario. Tel: +36-1-2283510

**3-10.8:** Skota semajno ĉe Glen Orchy. Inf: Petra Fantom, 92 Enborne Rd, Newbury, RG14 6AN, Britio. Rete: jeb@esperanto.org

**5-12.8:** 56-a IJK, Honkongo. Inf: LKK de IJK, P.O.Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio. Rete: epc@china-report.com

**5-12.8:** Renkontiĝo de E-istaj Familioj en Vác. Inf: István Bagó, Kert u. 17., HU-9081 Győrújbarát, Hungario. Rete: bago@kern.hu

**10-20.8:** OkSEJT-2000! Inf: Org. kom. de OkSEJT, ul. Ikrjanistovoj 2-28, RU-153003 Ivanovo, Rusio. Rete: oksejt2000@nm.ru

**15-20.8:** AERO-2000 Samarkand, Uzbekio. Inf: I-nacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Pf. 76, UZ-703000 Samarkand, Uzbekistano. Tel.: +998-662-331753, fakso: +998-662-310777. Rete (nur por mallongaj mesaĝoj!): peacetur@samuni.silk.org

**24-26.8:** 2-a E-kongreso de Hinda Oceano kaj Orient-Afrikaj Landoj, Antananarivo. Inf: LKK, Boite Postale 3171, MG-101 Antananarivo, Madagaskaro

**28.8-20.12:** Tutsemestra kurso en Lesjöfors. Inf: Karlskoga Folkhögskola, SE-691 24 Karlskoga, Svedio. Tel.: +46-(0)586-64600, fakso: +46-(0)586-46422. Rete: lars.forsman@fhsk.karlskoga.se

**Kio okazos? Eksciu ĉe http://www.esperanto.hu/kalendar.htm**

*septembro kaj poste*

**1-8.9:** TEJO-seminario en Varna. Inf: Sabira Ståhlberg, p. k. 405, BG-9000 Varna, Bulgario. Tel.: +359-52-246941, faks: +359-52-246326, rete: kontakto@esperanto.org

**21-24.9:** 11-a Mont-Kabana Renkontiĝo, Kranjska Gora, Slovenio. Inf: V. Radovanovic, Horvacanska 31, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Rete: Vanja.Radovanovic@etk.ericsson.se

**22-24.9:** Poma Semajnfino en Normandio. Inf: JEFO, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris, Francio. Tel: +33-139707815 (respondilo) Rete: jefo@esperanto.org

**21-22.10:** 5-a Lingva Festivalo, Ĉeboksari, Rusio. Inf: J. Ignatjeva, rete: asocio@chuvsu.ru

**22-25.10:** Monda Junularo per E – Amikaj Renkontiĝoj, Miercure-Ciuc. Inf: Jolanda Józsi, str. Patinoarului 12-A ap. 3, RO-4100 Miercurea-Ciuc, Rumanio

# La estraro de TEJO 1999 - 2001

**Prezidanto:** Sjoerd Bosga,
Trådragargatan 27D,
SE-72337 Västerås, Svedio
tel. (h) +46-21-417045
(o) +46 21-345018,
rete: sjoerd@esperanto.se

**Ĝenerala sekretario:**
Vladimíra Chvátalová,
Vysoèanská 763,
CZ-58291 Svetlá nad Sáz., Ĉeĥio
rete: vchvatalova@hotmail.com

**Kongresoj:** Holger Boos,
Kräuterweg 25,
DE-51069 Köln, Germanio,
Tel. (h) +49-221-6804798,
(port.) +49-172-2069551,
rete: Holger.Boos@esperanto.de

**Kasisto:** Ilja B.S. De Coster,
Varendrieskouter 47, BE-9031,
Drongen-Gent, Belgio,
tel k faks +32-9-2278664,
rete: Ilja.DeCoster@rug.ac.be

**Eksteraj rilatoj:** Aleksandr Blinov,
pr. I. Jakovleva 10A-63,
428027 Cheboksary, Rusio
tel. +7-8352-665908,
rete: esperant@chtts.ru

**Estrarano:**
Joaquín Rosillo Vega Acosta,
Calle 3 No. 33,
Col. San Pedro de los inos,
C.P. 03801, México, D.F.
Tel +52-5-515-3731,
rete: jrosillo@comversens.com

## Ŝanĝo en la TEJO-estraro

Pro ambaŭflanka interkonsento, Grigori Leonidoviĉ Arosjev forlasis sian postenon en la estraro de TEJO. Samptempe li ne plu estas membro de UEA/TEJO, kaj ĉesis sian kunlaboron pri la venonta TEJO-seminario (Varna, Bulgario). Dum la estraro de TEJO serĉas anstataŭanton kaj pridiskutas redividon de la estraraj taskoj, kontaktoj pri landa agado estas perataj de la TEJO-prezidanto Sjoerd Bosga (sjoerd@esperanto.se) kaj pri seminarioj fare de TEJO-volontulo en la CO, Sandra Schweder (tejo-oficejo@esperanto.org).

# TEJO serĉas volontulon!

## TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de TEJO-volontulo en la CO.

TEJO-volontulo devas preti labori dum maksimume unu jaro. La nova periodo de volontulado komenciĝu en aŭtuno 2000.

La TEJO-volontulo laŭeble:

- ☆ havu tre bonan Esperanto-nivelon (legan, skriban kaj parolan),
- ☆ scipovu la anglan kaj (/aŭ) francan, scipovo de aliaj lingvoj estos pozitive konsiderata,
- ☆ spertu pri uzado de komputilo, prefere Macintosh,
- ☆ havu profundajn konojn de la junulara Esperanto-movado,
- ☆ estu kapabla memstare preni decidojn,
- ☆ estu preta aktive kunlabori kun la estraro de TEJO rilate al la ĝenerala funkciado de la organizo,
- ☆ havu konojn de la eŭropaj junularaj strukturoj kaj eŭropaj instancoj.

La laboro konsistas el:

- ☆ pritraktado de la poŝtaĵoj al TEJO,
- ☆ prizorgado de la TEJO-arkivo,
- ☆ administrado kaj prizorgado de kontaktoj kun eŭropaj kaj neeŭropaj strukturoj kaj organizoj,
- ☆ aktiva subtenado de la agado de la estraranoj kaj komisiitoj de TEJO,
- ☆ aktiva kunlaborado en la verkado de subvencipetoj,
- ☆ aktiva kunlaborado en la aktualigo de la retpaĝoj de TEJO.

La volontulo ricevas senkostan ĉambron en la CO kaj dignan poŝmonon kiu garantias la vivtenon.

Kandidatoj estas invitataj sendi al la Centra Oficejo de TEJO la jenajn dokumentojn:

- ☆ vivresumon (priskribas viajn studojn, kursojn, spertojn, ktp),
- ☆ motivigan leteron (priskribas kial vi volas volontuli por TEJO),
- ☆ laŭeble pruvilojn de la supre postulataj kapablecoj kaj rekomendleteron de ekzemple landa Esperanto-organizo.

**Iom pri la volontula politiko de TEJO**

TEJO strebas al tio ke konstante estu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo, kiu povu dediĉi cent elcentojn de sia labortempo al TEJO. La estraro opinias ke esti volontulo ne nur signifas grave kontribui al la bonfarto de TEJO, sed ke ĝi samtempe signifas spertan pliriĉiĝon, ne nur personan sed certe ankaŭ movadan. La estraro limigas la daŭron de volontulado al proksimume unu jaro, tiel ebligante al multaj akiri tiujn spertojn.

Pli ol ĝis nun, la TEJO-volontulo ankaŭ dum kongresoj (IJK kaj UK) kaj TEJO-seminarioj estu la "vizaĝo" de la organizo, informante al membroj kaj aliaj interesatoj pri agado, aranĝoj, servoj ktp de TEJO. La volontulo tiel kontribuas al la videblo de TEJO dum kongresoj, kaj samtempe liberigas iom da tempo de la estraranoj.